


POR AKTIVA LINGVOPOLITIKO



AKTOJ DE LA
LINGVOPOLITIKA
SEMINARIO EN LA 81-A
UNIVERSALA KONGRESO
DE ESPERANTO,
PRAGO 1996

POR AKTIVA LINGVOPOLITIKO

POR AKTIVA LINGVOPOLITIKO

Aktoj de la Lingvopolitika Seminario en la
81-a Universala Kongreso de Esperanto, Prago 1996

D. Blanke, R. McCoy kaj O. Buller (red.)

Universala Esperanto-Asocio
Rotterdam 1999

ISBN 92 9017 062 X

© 1999 Universala Esperanto-Asocio

Kompostita en la Centra Oficejo de UEA

Presita ĉe Drukkerij Bariet bv, Nederlando

Enhavo

Enkonduke	7
DETLEV BLANKE	
Kio estas lingvoplanado?	9
HUMPHREY TONKIN	
Lingvoplanado en Japanio	15
YAMASAKI SEIKÔ	
Lingvoplanado en la (nov)hebrea	32
AMRI WANDEL	
Novaj defioj antaŭ la Akademio de Esperanto	35
WERNER BORMANN	
Kreoliĝo de Esperanto inter personaj gustoj kaj oficiala normo	43
RENATO CORSETTI	
Ĉu lingvopolitikon por Esperanto?	61
DETLEV BLANKE	
ALDONAĴOJ:	
Rezolucioj de la Komitato de UEA pri lingvopolitiko	69
Unua lingvopolitika seminario	71

Enkonduke

La Komitato de UEA en Tampere (1995) kreis komisionon pri lingvopolitiko kaj komisiis ĝin okazigi lingvopolitikan seminarion en la posta jaro. La seminario okazis sabate, la 20-an de julio 1996, en konferenca salono de la kongresejo de la Praga UK. Ĝi estis plenŝtopita.

Jam kelkfoje la Komitato de UEA rezoluciis pri la neceso de lingvopolitiko (vidu la unuan aldoniĝon, paĝo 69). La seminario estis provo komenci la diskuton. Ja estis evidente, ke ne regas unueca kompreno pri tio, kio estas aŭ povus esti la lingvopolitiko de UEA. La intenco ne estis finsolvi ĉiujn malfermajn demandojn, sed ekdiskuti la temon. Ni ja konsciis, ke devas sekvi aliaj seminarioj dum la estontaj kongresoj. Laŭ mia scio tio ne okazis. Tro multe dependas de la iniciato de unu aŭ du homoj. La seminarion mi preparis kaj gvidis.

La ĉefaj ideoj, laŭ kiuj estis elektitaj la traktendaj temoj, estis jenaj:

1. En la mondo ekzistas pli ol 150 lingvoplanaj institucioj.¹ Kial ne lerni de la problemoj de lingvoplanado en etnaj lingvoj? Pro tio la kontribuoj de Humphrey Tonkin, YAMASAKI Seikō kaj Amri Wandel.
2. En la historio de planlingvoj ekzistis diverskonceptaj lingvoplanaj/lingvo-kulturaj institucioj: estus bone kompari iliajn celojn kaj aktivadojn, aparte kun la Akademio de Esperanto (AdE). Pro tio la kontribuoj de Sergej Kuznecov kaj Werner Bormann (tiutempe prezidanto de la Akademio de Esperanto).
3. Kiom Esperanto sekvas en sia evoluo la kodigitajn normojn? Tio estas demando esence grava por la lingva instanco de Esperanto. Pro tio la kontribuo de Renato Corsetti.
4. Tre grava tereno (tamen ne la sola), kie reflektiĝas la evoluostato de ĉiu lingvo, estas la leksikografio. Ni scias, ke Esperanto ĉi-rilate ne estas en tre bona stato kaj ke necesas multe pli sistema kaj pli profunda laboro en tiu tereno.² Pro tio la kontribuo de John Wells.
5. Necesas plikonsciigi la lingvokomunumon, aparte ties plej gravan organizaĵon, UEA, pri la bezono de sistema lingvopolitika agado. Pro tio la kontribuo de Mark Fettes.

Bedaŭrinde ne ĉiuj prelegintoj liveris la tekstojn de siaj kontribuoj. Estas tamen utile publikigi la ricevitaĵojn, por ke la temo restu atentata kaj eble pludiskutata. Mi aldonas tekston, kiun mi dum la seminario enkonduke nur tre skize aludis. Ĝi montras mian pozicion pri la lingvopolitiko, kiu ne nur koncernu UEA, sed la tutan lingvokomunumon.

Eble la broŝuro helpas pludiskutigi la temon kaj finfine trovi tiujn homojn, kiuj ne nur estas kompetentaj, sed ankaŭ pretaj kaj kapablaj sin engaĝi organize.

Berlino, februaro 1999

DETLEV BLANKE

NOTOJ

1. Kp. i.a. Florian Coulmas (1992), *Die Wirtschaft mit der Sprache. Eine sprachsoziologische Studie*, Frankfurt/Main: Suhrkamp, pĝ. 143 kaj sekve; kaj Francesco Domínguez kaj Núria López (1995), *Sociolinguistic and Language Planning Organizations*, Amsterdam/Philadelphia: John Benjamins.

2. Eĉ je la danĝero, ke mi jam tedas iujn homojn, oni rigardu la modelan laboron, kiun faris Eugen Wüster verkante kaj eldonante sian Enciklopedian Vortaron.

Programo de la seminario

- | | |
|---------------|--|
| 9.30 - 9.35 | Bonvenigo (LEE Chong-Yeong) |
| 9.35 - 9.40 | Programklarigoj (Detlev Blanke) |
| 9.40 - 10.00 | <i>Kio estas lingvoplanado?</i> (Humphrey Tonkin) |
| 10.00 - 10.20 | <i>Lingvoplanado en Japanio</i> (YAMASAKI Seikô) |
| 10.20 - 10.40 | <i>Lingvoplanado en la (nov)hebrea</i> (Amri Wandel) |
| 10.40 - 11.10 | Diskuto |
| 11.10 - 11.30 | <i>Planlingvaj akademioj inter programo kaj realo</i>
(Sergej Kuznecov) |
| 11.30 - 11.50 | <i>Novaj defioj antaŭ la Akademio de Esperanto</i>
(Werner Bormann) |
| 11.50 - 12.10 | <i>Kreoliĝo de Esperanto inter personaj gustoj kaj oficiala normo</i>
(Renato Corsetti) |
| 12.10 - 12.40 | Diskuto |
| 12.40 - 13.00 | Paŭzo |
| 13.00 - 13.30 | <i>Ĉefaj tipoj de vortaroj – defioj al la Esperanta leksikografio</i>
(John Wells) |
| 13.30 - 14.00 | Diskuto |
| 14.00 - 14.20 | <i>Ĉu do ni havu nian lingvopolitikon kaj se jes, kiel realigi ĝin?</i>
(Mark Fettes) |
| 14.20 - 15.00 | Diskuto kaj konkludoj |

Kio estas lingvoplanado?

HUMPHREY TONKIN

Lingvo estas tre proksime rilata al idento: multaj homgrupoj difinas sin ĉefe laŭ la lingvo, kiun ili parolas. Oni povas diri, ke lingvo estas grava indikilo de etna identeco. Lingvoj vivas aŭ mortas, kreskas aŭ malkreskas, pro multaj faktoroj – ekonomiaj, juraj, politikaj – sed malofte pro pure lingvistikaj faktoroj. La sukceso de lingvo dependas ne de lingvaj faktoroj sed de la kunteksto, en kiu tiu lingvo funkcias.

Multaj homoj uzas pli ol unu lingvon, foje eĉ tri aŭ kvar, depende de la cirkonstancoj. Uzantoj de difinitaj lingvoj kutime havas antaŭ si certajn elektojn kaj alternativojn:

1. En plurlingva socio ili povas elekti unu lingvon super aliaj: la flandran aŭ la francan en plejparte dulingva Belgio, la sukuman aŭ la svahilan en multlingva Tanzanio, la francan aŭ la bretonan en Francio (kie ekzistas unu nacia lingvo kun granda plimulto de parolantoj, kaj pluraj regionaj lingvoj); aŭ, se temas pri internacia medio, la anglan (la plej parolata interlingvo internacia) aŭ ekzemple Esperanton.
2. Ili povas elekti unu dialekton prefere al alia – aŭ difinitan sociolekton (variaĵo de lingvo bazita ne sur geografia deveno sed sur socia situo).
3. Ili povas elekti difinitajn parolturnojn, aŭ difinitajn vortojn, aŭ difinitajn parolmanierojn.

Kompreneble, neniu denaska parolanto de tiu aŭ alia lingvo estas komplete libera en tiu elekto: la cirkonstancoj de tiu naskiĝo (geografiaj, etnaj, ekonomiaj, klasaj ktp) esence determinas la lingvan konduton de la koncerna persono, kvankam postaj cirkonstancoj (edukado, laborado, translokiĝo) povas ankaŭ havi profundan efikon. Oni do povas diri, ke inter la faktoroj, kiuj decidigas la lingvoelekton estas, unue, ekonomiaj kondiĉoj, kaj, due, sento de lojaleco al difinita lingvo aŭ kulturo. Homoj havas certajn atendojn pri certaj rezultoj en la elekto de unu lingvaĵo prefere al alia. (“Se mi elektos la anglan super mia denaska gaela, mi pli facile trovos laboron.” “Se mi elektos la gaelan super mia denaska angla, mi pli klare esprimos mian naciecon.” “Se mi parolos la anglan per kimra akcento, oni identigos min kun tiu lando.” “Se mi evitos kimran akcenton en la angla, oni malfacile scios, de kie mi estas.”)

Lingvoplanado estas *konscia interveno en tiun procedon de lingvo-elekto por influŭi la koncernajn elektojn*.

Tradicie, oni distingas du branĉojn de la lingvoplanado:¹

1. *Statusa planado* estas decido pri la statuso de difinitaj lingvoj en difinita socio, ekzemple:
 - elekto de lingvo de instruado en lernejoj;
 - emfazo de certaj fremdaj lingvoj super aliaj en la lernejoj;
 - elekto de unu aŭ pluraj ŝtataj oficialaj lingvoj, aŭ de unu dialekto prefere al alia;
 - elekto de laborlingvo(j) en difinita internacia organizaĵo;
 - elekto de laborlingvo en entrepreno;
 - leĝoj pri utiligo de difinitaj lingvoj en afiŝoj ktp.
2. *Korpusa planado* estas interveno en la formojn de lingvo, ekzemple:
 - decido pri adopto de difinita skribsistemo;
 - enkonduko de difinitaj vortoj;
 - decidoj pri majuskligo aŭ pri literumo;
 - deklaroj, ke difinitaj parolturnoj estas akcepteblaj, aliaj ne;
 - preskriba (kontraste al priskriba) verkado de vortaroj, terminaroj, aŭ konsiloj pri stilo.

Iuj fakuloj diferencigas inter *lingvopolitiko* (praktika akceptigo de difinitaj normoj kaj reguloj) kaj *lingvoplanado* (faka decido inter difinitaj lingvaj formoj). En tiu senco, lingvoplanado rezultas el kaj kondukas al lingvopolitiko.

Aliaj fakuloj faras diferencigon inter *lingva determino* (la elekto de difinita lingvo) kaj *lingva evoluigo*.² Laŭ Ferguson, ekzemple, lingva evoluigo havas tri aspektojn:

- *Skribsistemigo*. Oni devas decidi pri la maniero, laŭ kiu oni skribu la lingvon, elektante inter diversaj jam ekzistantaj sistemoj, aŭ, tie kie lingvo ne jam havas skribsistemon, elektante sistemon jam ekzistantan por aliaj lingvoj kaj modifante ĝin laŭbezone.
- *Normigo*. Necesas elekti inter dialektoj por starigi normajn formojn, tiel ke en difinita socio nur unu formo estu uzata. Tio povas tuŝi gramatikon, vortprovizon, vortkonstruon, elparolon, skribmanieron ktp.
- *Modernigo*. Foje necesas aldoni novajn leksikajn formojn por taŭgigi la lingvon por moderna uzo, ekzemple en scienco, komerco aŭ juro. Eventuale modernigo povas etendiĝi preter simplaj vortprovizaj demandoj por tuŝi gramatikon kaj stilistikon.

Inter la evoluigaj kaj specife normigaj motoroj je la dispono de nacia registaro, ekzemple, estas lernejoj, armeoj kaj ŝtataj burokratioj, sed tia normigo ankaŭ okazas pere de ĝenerale agnoskata elita aŭ prestiĝa lingvouzo kaj per amas-komunikiloj.

Siatempe, multaj lingvoplanistoj emfazis la *instrumentan* aspekton de lingvoj: ili celis krei lingvajn rimedojn maksimume praktikajn kaj komunike efikajn, sed hodiaŭ ili malmulte okupiĝas pri elserĉo de la plej bonaj lingvistikaj solvoj kaj emas al pli *socilingvistika* aliro, agnoskante, ke la plej lingve efikaj rimedoj ne nepre estas la plej akcepteblaj.³ Tra la jaroj, la fakuloj lernis, ke ne sufiĉas insisti, ke la homoj ŝanĝu sian konduton: necesas, ke homoj volu ŝanĝi kaj komprenu la avantaĝojn.

En tiu rilato, Haugen prezentas tri kriteriojn por la elekto de difinita lingva plano:⁴

- *efikeco*, t.e. facileco de lernado kaj uzado;
- *adekvateco*, tiel ke la koncerna solvo transdonu informojn sufiĉe precize;
- *akceptebla*, tiel ke la homoj estu efektive konvinkitaj sekvi la planon.

El la tri, akceptebla pleje gravas. Multaj faktoroj influas ĝin, ekzemple la konduto de opinioformantoj (intelektuloj, politikistoj, verkistoj), la komunikaj strukturoj en iu socio (amasrimedoj, rolo de la registaro, edukado), historio kaj kulturo, kaj formalaj uzoj de la lingvo.

Ĝenerale, skriba lingvaĵo estas pli facile influebla ol parola, ĉar la sociaj kondiĉoj en kiuj skriba lingvaĵo estas uzata, estas pli limigitaj kaj pli rigidaj ol ĉe parola. Estas ĉiam pli facile influi la formalan uzadon de lingvo ol la neformalan: oni povas dikti al burokratoj pri lingvouzo, sed malfacile regi la matenmanĝajn, ĉe-familiajn parolajn interŝanĝojn de la homoj.

Ĉiu lingvoplana decido potencie ŝanĝas la kondiĉojn, en kiu lingvo estas uzata, kaj tiuj ŝanĝoj havas malavantaĝojn kaj avantaĝojn. Ekzemple, decido latinigi la skribsistemon de la ĉina detruus la interkompreneblon de la diversaj dialektoj (aŭ, pli ĝuste, lingvoj), kiuj komune grupiĝas sub la sama ombrelo de interkompreneblo; forigo de la latina lingvo kiel la laborlingvo kaj diserva lingvo de la Romkatolika eklezio ebligas pli aktivan partoprenon de la kredantoj, sed disdividas ilin laŭ etnaj linioj; plurlingvismo estas multekosta en Hindio, sed utiligo de unusola lingvo disrompus la politikan interkonsenton de la lando.

Lastatempe, iuj fakuloj klopodis analizi la kostojn kaj avantaĝojn de elekto de difinitaj lingvoj, de normigo, de plurlingveco ktp. Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED) antaŭ kelkaj jaroj dediĉis konferencon al tiu temo, kaj nia Nobelpremiito Selten kunlaboris kun Pool en studo pri la demando.⁵

Laŭ miaj ĵus donitaj ekzemploj, estas klare, ke lingvoplanado ne estas afero nur de registaroj. Ĝi tuŝas internaciajn organizaĵojn: ekleziojn, Unuiĝintajn Naciojn, entreprenojn.⁶ Ĝin ankaŭ forte influas eksterregistaraj elementoj, kiel ekzemple eldonado (la invento de presilo kun moveblaj literoj, kaj la posta aperigo de la germana traduko de la Biblio havis profundan normigan efikon je la germana lingvo; la starigo de presejo en Londono fare de Caxton en la dekkvina jarcento simile efikis je la angla), profesiaj organizaĵoj ktp.

Lingvoplanado povas etendiĝi ĝis tio, kion oni nomas *identoplanado*: klopodoj igi certajn identojn pli allogaj, aliaj malpli.⁷ La elekto de latina skribo en Moldavio, anstataŭ la antaŭa cirila, identigis tiun landon kun Okcidento (kaj kun Rumanio) kaj for de Oriento (kaj Rusio); simila decido en Azerbajĝano havis similan efikon, proksimigante tiun landon kun ties turka pasinteco, kaj distancigante ĝin de ĝia rusa historio.

Se ni aplikas tiujn diversajn difinojn al Esperanto⁸, ni povas tuj konstati, ke, laŭ la kriterioj de Haugen, Esperanto estas *efika* kaj *adekvata*: tion bone pruvis cent jaroj da utiligo. Sed estas malpli evidente, ke ĝi estas *akceptebla*: multaj homoj tute klare ne akceptas ĝin, almenaŭ ĝis nun. Ni povas ankaŭ konstati, ke, proponante Esperanton kiel lingvon de Unuiĝintaj Nacioj, ni celas influi la *statuson* de la lingvoj en tiu medio; partoprenante kunsidon de la Akademio de Esperanto, ni celas aliri la *korpusan* enhavon de la lingvo. La Akademio, do, estas unuavice (kvankam ne ekskluzive) instrumento de korpusa planado, same kiel la Akademioj de aliaj lingvoj.⁹

Esperanto estas pli facile influebla ol multaj aliaj lingvoj ĉar ĝi havas relative malgrandan uzantaron, kiu plejparte *elektis* lerni ĝin kaj sekve ne havas tiel fortan investon en difinitaj formoj kiel havas denaskaj parolantoj de difinita lingvo. Krome, granda procentaĵo de la lingvaj interŝanĝoj en Esperanto estas skriba, ne parola, kaj la skriba lingvo estas pli formala kaj pli influebla.

Inter la institucioj, kiuj evoluigas la lingvouzon en Esperanto (kaj sekve normigas kaj modernigas) estas la diversaj organizaĵoj, kaj precipe la grandaj, kiel UEA: ni havas grandan respondecon bone uzi la lingvon en niaj Universalaj Kongresoj, ĉar la Kongresoj havas decidan efikon je la lingvouzo de izolitaj homoj dum la cetero de la jaro. La revuo *Esperanto* havas gravan efikon, kiel ni konstatis en tiuj kazoj, kie la oficiala pozicio de la Akademio de Esperanto ne koincidis kun la norma uzo de tiu revuo (kvankam la vorto *komputilo* estas malpli efika kaj adekvata ol, ekzemple, *komputoro*, tiu ĉi montriĝis malpli akceptebla; sekve *komputilo* venkis).

Aliaj gravaj influoj, ĉu konservativaj ĉu progresivaj, estas niaj verkistoj, niaj vortaristoj, niaj lernolibroj, niaj kongresoj, kaj niaj radioprogramoj, precipe Pola Radio. La verkistoj eksperimentas kun la lingvo, same kiel foje faras la gazetaj redaktoroj aŭ la gvidantoj de organizaĵoj. Oni povus verki tutan eseon, ekzemple, pri la ideologiaj kaj historiaj implicoj de la demando *-io/-ujo* ĉe geografiaj nomoj. Kaj, se temas pri vortaroj, kion fari por difini la normojn de lingvouzo en Esperanto sur kiuj konstrui *priskriban* vortaron? Ĉu eblas klare distingi fluan, norman parolanton de Esperanto disde komencanto aŭ lernanto? En Esperanto grandas ne nur la tento sed ankaŭ la neeviteblo foje preskribi, ĉar ne ekzistas sufiĉe klaraj normoj aŭ adekvataj precedentoj en tiu aŭ alia tereno de lingvouzo por bone preskribi.

Ni ĉiuj partoprenas, laŭ niaj diversaj manieroj, la lingvoplanado de nia planlingvo Esperanto. Indas, ke ni konsciu, kion ni faras, por tiel fari ĝin pli bone kaj pli efike.

NOTOJ

1. Vidu Einar Haugen, "Dialect, Language, Nation", *American Anthropologist* 68 (1966): 922-35. R. L. Cooper, *Language Planning and Social Change* (Cambridge: Cambridge University Press, 1989) identigas trian aspekton, diferencigante tion, kion li nomas "akira planado" – la planado de lingva instruado kaj lernado – disde la aliaj du. Aliaj fundamentaj anglalingvaj verkoj pri lingvoplanado estas Carol Eastman, *Language Planning* (San Francisco: Chandler and Sharp, 1983), Juan Cobarrubias kaj Joshua Fishman (red.), *Progress in Language Planning* (Berlin: Mouton, 1983), kaj Chris Kennedy, *Language Planning and Language Education* (London: Allen and Unwin, 1984). Vidu ankaŭ Moshe Nahir, "The Five Aspects of Language Planning", *LPLP* 1 (1977): 107-23. Bonan resumon de la esencaj demandoj oni trovas en Ralph Fasold, *The Sociolinguistics of Society* (Oxford: Blackwell, 1984) kaj, pli lastatempe sed malpli detale, en John Edwards, *Multilingualism* (London: Penguin, 1995).

2. La distingon faras Bjørn Jernudd, "Language Planning as a Type of Language Treatment", en Joan Rubin kaj Roger Shuy (red.), *Language Planning: Current Issues and Research* (Washington: Georgetown University Press, 1973): 11-23. Pri lingva evoluigo vidu Charles A. Ferguson, "Language Development", en J. A. Fishman, C. Ferguson, kaj J. Das Gupta (red.), *Language Problems of Developing Nations* (New York: Wiley, 1968): 27-36.

3. Fasold, *Sociolinguistics*, pĝ. 250. Pro tio, la fakuloj lastatempe pli multe interesiĝas pri elektado inter alternativoj kaj malpli pri devigaj kaj juraj ŝanĝoj, kiuj ofte ne taŭgas en demokrazia etoso. Vidu ekzemple Martin Pütz (red.), *Language Choices: Conditions, Constraints, and Consequences* (Amsterdam/Philadelphia: John Benjamins, 1997), kaj precipe la kontribuon de Florian Coulmas, "A Matter of Choice", pĝ. 31-44.

4. Einar Haugen, "Linguistics and Language Planning," en William Bright (red.), *Sociolinguistics* (The Hague: Mouton, 1966): 50-71.

5. Humphrey Tonkin kaj Karen Johnson-Weiner (red.), *The Economics of Language Use* (New York: Center for Research and Documentation on World Language Problems, 1987).

Reinhard Selten kaj Jonathan Pool, *Ĉu mi lernu Esperanton? Enkonduko en la teorion de lingvaj ludoj*, Working Papers 112 (Bielefeld, Germanio: Institute of Mathematical Economics, University of Bielefeld). Vidu ankaŭ François Vaillancourt, "The Economics of Language and Language Planning", *LPLP* 7 (1983): 162-178.

6. Koncerne UN kaj aliajn internaciajn lingvopolitikajn demandojn, vidu plurajn kontribuaĵojn (ekz. Fettes, Tonkin, Piron) en Sylvie Léger (red.), *Vers un agenda linguistique: Regard futuriste sur les Nations Unies / Towards a Language Agenda: Futurist Outlook on the United Nations* (Ottawa: Centre canadien des droits linguistiques, Université d'Ottawa, 1996).

7. Jonathan Pool, "Language Planning and Identity Planning", *International Journal of the Sociology of Language* 20 (1979): 5-21.

8. Vidu tiurilate Mark Fettes, "Esperanto and Language Policy; Exploring the Issues," *LPLP* 21 (1997): 66-77, kaj lian raporton "Unika eksperimento gajnas novajn amikojn," *Esperanto*, vol. 89 (1996): 162-164.

9. Pri la rolo de lingvaj akademioj vidu John Edwards, *Language, Society and Identity* (Oxford: Blackwell, 1985): 27-34.

Lingvoplanado en Japanio

YAMASAKI SEIKÔ

En grandaj konturoj, estis du provoj de lingvoplanado en la moderna Japanio: parolstiligo de la skriba lingvo, kaj limigo kaj forigo de ĉinaj ideogramoj. Rimarkinde estas ke paralelaj movadoj sin trovas en Ĉinio, postirantaj Japanion per iom da malfruo. La unua estis antaŭenigita kiel literatura movado en Japanio, kiel forte politike kolorigita kultura movado en Ĉinio; la dua, kiel raciigo de edukado kaj de industrio komencita de privatuloj kaj plenumita de la Ministrejo de Edukado en Japanio, kaj same ankaŭ en Ĉinio sed kun malmulta konsciiĝo pri industrio. La unua sukcesis en ambaŭ landoj fine de la 19-a jarcento kaj frue en la 20-a respektive. La dua, ŝajne pura kultura movado, koliziis kun la politika reakcio en ambaŭ landoj; en la naciista Ĉinio ĝi komplete fiaskis, realigota sub la komunista registaro, kiu rapide reakciiĝis kaj finiĝis per rezigno pri anstataŭigo de ideogramoj per la latina alfabeto kaj per uzo de tiu ĉi nur kiel fonetikaj signoj (granda progreso, certe, en la klerigo de la amaso), dum en Japanio ĝi sukcesis, rajdante la tajdon de demokratiigo post la malvenko de la japana imperiismo, sed estis haltigita de la revolto de literaturistoj kaj de la ĝenerala reakciiĝo de la politiko, kiu neas la atingon de la postmilita demokratio¹ kaj provas revivigi tradiciajn valorojn. La sinteno de la japanaj literaturistoj estas tiamaniere inversaj en la du movadoj.

Tabelo de enhavo

- | | |
|---|---|
| 1. Parolstiliga movado | |
| 2. Sama movado en Ĉinio | |
| 3. Reformo de skribado | |
| I. Antaŭmilita | II. Postmilita |
| a. Movado por la abolicio de la ĉina ideografio | a. Mielluno de la lingvo-planado |
| i. Anstatuigo per kanaoj | b. Kontraŭatako; Suplementa rimarko pri la fakaj terminoj |
| ii. Latinigo | c. Kiel en Ĉinio? |
| iii. Limigo de ĉinaj literoj – iniciativo de la Ministrejo de Edukado | |
| iv. Kontraŭparto en Ĉinio | |

1 Parolstiliga movado

La termino “parola stilo” ĉi tie estas mia provizora traduko de la japana *kōgo*, kiu havas specifan signifon kaj ne estas vorto svage indikanta stilon proksime al tiu kiam oni konversacias. Ĝi estas uzata kontraste kun la skriba stilo, *bungo* japane, kiu havas gramatikon apartan de la parola: sintakso ne multe malsamas, sed morfologio estas tute diferenca; ekz. dum en la moderna japana ekzistas nur du regulaj konjugacioj kaj du neregulaj (jes, la japana konas konjugacion, tute fleksilingve), la skribstila lingvo havas kvin regulajn kaj kvar neregulajn. Ili malsimilas unu al la alia kiel latino al la itala, aŭ la malnova alta germana al la moderna.

La nunaj japanoj skribas en la parola stilo, sed tio ne signifas ke ili parolas en la “parola stilo”: iuj formoj en tiu ĉi stilo ne estas uzataj en ĉiutaga interparolo. Tio ne estas pli stranga ol tio ke la francoj ne uzas imperfekton de subjunktivo en konversacio. La “parola stilo” japana entenas do formojn ne vere parolajn, kio estas ordinara en iu ajn lingvo; kaj inverse iuj skribstilaj idiotismoj kun malnova gramatiko fosilie supervivas en parola lingvo, kio ankaŭ estas komuna fenomeno tra la mondo.

Kiel sciante, Japanio remalfermis siajn pordegojn post du jarcentoj da izoliĝo de la ekstera mondo meze de la 19-a jarcento kaj komencis transformi sin en modernan ŝtaton. Okazis amasa traduko en la indiĝenan lingvon por la importado de ĉiuj kulturaĵoj de Okcidento.

La efiko de tiu ĉi procezo sur la skriba lingvo estis jeno: La unua kiu okulfrapas alilandanojn estus ke la japanoj ne prunteprenis fremdajn vortojn, sed tradukis ilin. Rezulte, la nuntempa vortaro de instruiteco entenas malmulte da internaciaj leksikeroj, en granda kontrasto al tiu de ekskolonioj en la tria mondo, por ne paroli pri Okcidento, kie jam de post la helenismo kaj la roma imperio ekzistas enradikiĝinta komuna tradicio klasika. Oni povus facile diveni la malfacilon por la disvastiĝo de Esperanto en tiu ĉi lando, kie mankas komuna grundo de universala leksiko. Niaj vortoj por, ekz., *filozofio* aŭ *algebro* estas tute aliaj ol en la resto de la mondo, krom Ĉinio kaj Koreio.

Tiaj terminoj tamen ne estas aŭtoktonaj: ili estas tradukaĵoj en la klasikan ĉinan. Oni povas senfine krei novajn kunmetaĵojn el ĉinaj vortoj unusilabaj, kaj en la lasta jarcento produktiĝis multege da tiaj vortoj en Japanio, kiuj estis siavice reimportitaj en Ĉinion, imitanta la japanan vojon de modernigo.

Tiu procezo estis gvidata de burokratoj en la nova registaro, inkluzive de profesoroj de ŝtataj universitatoj. Temis pri lingvoplanado sub la iniciato de la ŝtato, grandioza.

Tio preĝis profunde la skriban lingvon modernjapanan. Tiuj portantoj de modernigo, eksrevolucioj sin dediĉintaj al la renverso de la mezepoka, ŝanceliĝanta ŝtatstrukturo de la tria ŝogunejo de la familio Tokugawa, estis tre kleraj en la ĉina klasiko kaj en la atingo de la okcidenta kulturo, konantoj de la plej bonaj de la du mondoj. Tiamaniere, la lingvo de la kancelario fariĝis nekomprenbla de la plebo. Tiu stato de aferoj daŭris principe senŝanĝe ĝis la falo de la japana imperiismo en 1945.

La skribstila lingvo kompreneble ne restadis sama tra la tuta historio. Komence, t.e. ekde la starigo de politika potenco en la 4-a ĝis 5-a jarcento, precipe de post la estiĝo de centrigita ŝtatstrukturo laŭ la modelo de la ĉina imperio de la dinastio *Tang* en 645, la oficiala lingvo de la burokratio estis la ĉina pura kaj simpla. Divido fare de mezepokaj kavaliroj de la potenco kun la antikva aristokratio de mandarenoj de post la 13-a jarcento donis popularigan efikon sur la ĵargonon de administrado, kaj la idiomo en politiko kiun la nova elito el la tavolo de samurajoj al si servis estis tiu vulgara sinkretismo de la ĉina kaj la japana. Tion anstataŭis, sur la sojlo de modernigo, nova stilo en iu pseŭdoklasikĉina, skribita tamen per ĉinaj ideogramoj pridissemataj de propre japanaj silabaj fonogramoj, kanaoj (vidu PIV), kaj tio en unu speco de tiuj ĉi, *katakana*, kion notu por referenco al la posta parto de tiu ĉi referaĵo.

Tiom pri la lingvoplanado “oficiala”. Nun pri la civila kaj la literaturo.

Unuvorte, tiu tereno estis en la mano de privatuloj, kiuj tamen konscie klopodis por la kreo de norma skriblingvo “parolstila”. Se oni nomas planado konscian strebon, tio estis alia formo de lingvoplanado.

Unue, la japanoj ne devas inventi norman lingvon, parolan aŭ skriban, kiel en Norvegio, aŭ lerni mortintan (krom en limigita sfero) lingvon, kiel en Israelo. Tia jam ekzistis. La ŝogunejo de la *Tokugawa* devis vasalojn, tenantajn teritorian ŝtaton, kiel *Land* en la germana imperio, viziti regule la kortegon en *Edo*, kiel estis nomata siatempe la nuna Tokio, kaj loĝigi sian edzinon en la ĉefurbo kiel ostaĝon, kvankam tiu ĉi lasta estis aboliciita poste, kun la rezulto ke en *Edo* formiĝis cirklo de aristokratio kiel en Versajlo sub Luizo XIV kun tuta aparato de burokratoj de la centra registaro kaj de la ĉefurbe rezidantaj oficistoj de provincaj senjoroj kaj burĝoj kaj metiistoj parazitantaj sur ili. La nuntempa japana estas prainfano de tiel nature kreskinta nova dialekto, ankaŭ komune komprenebla de ĉiuj provincaj membroj de la reganta klaso. Pli precize, la norma japana baziĝas sur, laŭ la ĝenerale akceptita difino, lingvo de la mezklasanoj en la “supra urbo” de Tokio (distinge de la “malsupra”, *downtown* en la angla, sed en la japana, fizike malalta, proksime de la golfo de Tokio, kie loĝis komercistoj kaj malgrandaj

metiistoj), ĝi do estas idiomo de oficistoj. Tiu dialekto faras izolitan insulon en la maro de la orientaj dialektoj en la regiono *Kantô* pro tio ke ĝi estas hibrido de tutlandaj dialektoj, sed fundamente vario de la orientaj².

Tiu parola lingvo tamen ne posedis stabilan skriban stilon ĉar oni ne skribis en tiu dialekto, la norma lingvo *de facto*. Edukitoj devis skribi ĉiam skribstile. Certe, politikistoj oratoris en la nacia, ho devas esti, imperia, parlamento, en parola lingvo, sed kiam ili presigis sian paroladon, ĝi estis en skriba stilo, nur en stenografita dokumentado oni povas legi parolstilan tekston. *HUKUZAWA Yukiti*, la Voltero de Japanio, elektis tre facilan stilon, sed laŭ la skriblingva gramatiko; sed lia aŭtobiografio, redaktita el stenografia teksto, enhave tre interesa cetere, estas escepte en parola lingvo, kaj tiu ĉi estas apenaŭ diferenca de la nuntempa.

La parolstiligo de la skriba lingvo devis komenciĝi kiel literatura movado, ekster la ŝtata maŝinaro. Oni povus diri ke ĝi komenciĝis ĉirkaŭ la 1880-aj jaroj kaj kompletiĝis dum la unua jardeko de la 20-a jarcento. Mi ne eniros en ties detalojn. Abundas literaturo pri tio. Ĝi estas analoga al movado en la malfrua mezepoko en Eŭropo por starigo de nacia lingvo kontraŭ latino, kies reprezentantoj estis figuroj ekde Danto ĝis Kartezio. Mi menciuj nur unu el la pioniroj de tiu ĉi movado, kaj verkinto de la unua vere moderna romano en tiu ĉi lando³, *HASEGAWA Hutabatei*, kiu estis aŭtoro de la unua lernolibro de Esperanto en Japanio⁴.

2. Sama movado en Ĉinio

Ĉinio venis en kontakton kun Okcidento pli frue ol Japanio, sed kvankam Japanio sukcesis sin modernigi, nome sin metamorfozi en plenkreskan imperiisman ŝtaton per sklava imito de la okcidentaj potencoj kun iliaj ruzoj kaj krueloj, tamen Ĉinio malsukcesis sub la subpremo de azie⁵ severa mezepoka ŝtatpotenco bazita sur feŭdaj produktrilatoj kaj de la okcidentaj potencoj, kiuj jam sukcesis duon-koloniigi Ĉinion post ol plene koloniigi Hindion.

Tiuj cirkonstancoj dotis ĉiun ajn movadon cele al modernigo per revolucia karaktero kun granda kontrasto al Japanio, kie streboj al modernigo de la spirito, t.e. liberigo de la individuo el la komunumo, kiu ne-eviteble kolizios kun ĉio azia, kunfandiĝis kun la reformo de supre. Tiu por la parolstiligo de la lingvo en Ĉinio estis forte kolorigita de politiko.

En 1914 estis fondita la gazeto *Nova junulo* kiel la organo de la tiel nomata movado por la nova literaturo. Ties lulilo estis la universitato de Pekino, tiam kiel nun plej elita altlernejo en tiu lando. La ĉefaj kontribuantoj estis la rektoro

Cài Yuánpéi, kiu invitis al sia lernejo *Chén Dúxiù* kaj *Hú Shì*. Tiuj personuloj simbole enkorpiĝas la postan politikan historion de tiu lando. Doktoro *Cài* reprezentas la popolfroktan karakteron, se false anticipi Francion de 1936, de la ĉina revolucio: li ankoraŭ nun estas respektata en la komunista Ĉinio, sed envere milda klerulo. Fakte, la ĉinaj komunistoj celis unue burĝan revolucion, kiel la japanaj cetere, kaj nur ili povis komplete forigi feŭdan terproprieton en la plej grandskala terkulturista milito en la monda historio. Nur ili povis forpeli koloniistojn, kiuj afiŝis en ŝanhaja parko ke la ĉinoj kaj hundoj estas malpermesataj. Nature, Lusin kunlaboris. Li venigis la rusan poeton-esperantiston Eroŝenko el Ŝanhajo al Pekino, kie tiu ĉi prelegis pri Esperanto en la universitato. *Chén Dúxiù* estis ĝenerala sekretario de la Ĉina Komunista Partio, unu el ties fondintoj, kaj poste ostracismita kiel trokiisto. *Hú Shì*, pri kiu *Chén Dúxiù* skribis en *Nova junulo* ke tiu kiu komencis la movadon de la nova literaturo estis lia amiko *Hú Shì*, finis sian vivon en Tajvano, sekvinte la naciistan registaron de *Jiang Jièshí* (konata per la angla literumo *Chiang Kaishek*, en suda dialekto), fidele al sia konvinko kiel burĝa liberalulo.

La agitado kontraŭkoloniisma kaj demokratiiga kulminis en la kontraŭjapana kampanjo de la kvina de majo 1919. La lingva movado marŝis mano en mano kun ĝi. Tio estis mallongvivaj feliĉaj tagoj antaŭ la ŝanhaja masakro de laboristoj fare de la naciistoj en 1927, priskribita de *André Malraux* en *Kondiĉo homa*. La parolstiligado perfektigis same kiel en Japanio.

3. Reformo de skribado

I. Antaŭmilita

a. MOVADO POR LA ABOLICIO DE LA ĈINA IDEOGRAFIO

En 1866, unu jaron antaŭ la tiel nomata Restaŭro de *Meizi*⁶, vasalo de la 15-a kaj lasta ŝoguno, *MAESIMA Hisoka*⁷, prezentis al tiu proponon por la abolicio de la ĉinaj literoj. Tio estis la unua konscia iniciato en la historio de la kontraŭ-ideografia movado krom sporadaj, trovataj ĉe intelektuloj kiuj estis impresitaj de la stato en okcidentaj landoj, kie oni uzas nur 26 literojn por skribi, informitaj de fremdlandanoj kiuj hazarde venis drivintaj al la marbordo de tiu ĉi malpermesita lando⁸. Tre nature, la elpaŝo tro devancinta la epokon ne estis serioze akceptita.

Poste sub la imperiestra regado komencis sprosi opinioj favoraj al la forigo de la ideogramoj. Mi nur menciu *ÔTUKI Humihiko*, heredinto de familio de generacioj da fakuloj pri konfuceanismo kaj kompilinto de la unua modernmetoda leksikono

de la japana *Genkai* (“Maro de vortoj”), kiu ankoraŭ nun restas interesa legaĵo pro siaj abundaj ekzemploj⁹, organizis en 1883 “Societo de la Kanaoj”, celanta ekskluzivan uzon de kanaoj.

i. ANSTATATAŬIGO PER KANAŬOJ

Nombro da grupoj por la forigo de la ĉina ideografio reduktiĝis post selekto de la tempo al du: a) tiu por disvastigo de la “horizontale skribitaj *katakana*”, kaj b) latinigo laŭ la ortografio *japana*.

La adjekto *horizontale* mirigus, sed estas komprenebla se oni scias ke la tradicia skribado ĉina kaj japana estas vertikala, kaj de dekstre al maldekstre, t.e. skribi de supre al malsupre kaj ĉefine de linio, komenci novan linion maldekstre de la ĵus finita, tial, se oni skribas en horizontale longa tabulo, kiel en dediĉo al konstruaĵo, literoj aranĝiĝas en unu linio legenda de dekstre al maldekstre, ĝuste kiel en la araba kaj la hebrea. Tiu celo estis realigita, kiel eksplikote malsupre, dum la lingvoreformo post la milito. Ĝi havis tamen revolucian efikon antaŭ la milito. La horizontala skribado estas esence racia, sed ne nur tio: ĝi akiris politikan nuancon – ne, pli ol nuancon, realan fizikan efikon; ekz. la ŝtata fervojo decidis en 1927, je la instigo de la societo por kanaoj, skribi en stacioj ties nomon de maldekstre al dekstre, sed tuj poste okazis alterno de la registaro, kaj la nova ministro pri fervojoj *OGAWA Heikiti* renversis la decidon, dirante ke tio kontraŭas la tradicion de la lando.

Kial *katakana* anstataŭ *hiragana*? Unue, la paralela uzo de du specoj de kanaoj estas malsimpla. Se elekti unu, devas esti *katakana* pro tio ke a) ĝi estas de pli simpla formo kun geometriaj linioj, facile lerneblaj de la infanoj, derivite de “radikaloj”, aŭ konstrublokoj, de ĉinaj literoj, kontraste kun *hiragana* evoluintaj el la manskriba formo de plenaj formoj, artismaj, de belaj kurbe subtilaj linioj; kaj b) ĉar ĝi estas konstrublokoj de ĉinaj literoj, kaj kombinas facile kun aliaj *katakana* por formi integran *Gestalt* [formo], helpante per tio rapidan kapton de vorto.

La movado por la kanao startis kiel movado inter aferistoj. La iniciatinto estis *YAMASITA Yositarô*, ĝenerala direktoro de la potenca konzerno Sumitomo, kaj la centro de ĝia forto estis en Kansajo, regiono industria kaj komerca en la okcidenta parto de la lando, kontraste al la politika centro Tokio¹⁰. La unua paŝo konkreta de *Yamasita* estis komisi desegnadon de japanlingva skribmaŝino al inĝeniero *Stickney* ĉe la usona firmao *Underwood*. La nuna norma klavaro japana ankoraŭ estas tiu decidita de *Kanamozikai*, societo por kanaoj, fondita de li en 1920.

ii. LATINIGO

La movado por latinigo, kontraste al tiu por kanaigo, komenciĝis inter sciencistoj. La gvidanto ekde la komenco ĝis post la malvenko en la dua mondmilito estis doktoro *TANAKADATE Aikitu*, enkondukinto de la moderna fiziko en Japanion. Lia posteulo en la katedro de fiziko ĉe la universitato de Tokio, profesoro *TAMARU Takurô*, estas konata batalanto por la movado, verkinta novan gramatikon¹¹ de la japana kaj, en sia fako, norman lernolibron universitatnivelan *Mekaniko* en latinaj literoj. Se citi alian renomman specimenon, *TERADA Torahiko*, ankaŭ de la sama katedro, literatura disĉiplo de *NATUME Sôseki*, nun konata en la mondo tra multaj tradukoj en okcidentajn lingvojn, giganto paralela al *MORI Ôgai*. Li verkis sciencpopularigan libron, *Fiziko de la maro*, en latinaj literoj. Liceaj instruistoj rekomendadis liajn multajn eseojn en la stilo de *Charles Lamb* kiel modelon de japana prozo. Tiu movado estas de moderaj liberaluloj en kurta periodo de sereno tuj antaŭ la tenebra epoko de faŝismo post la 1930-aj jaroj. Oni tamen trovas iujn tendencojn kiuj, kiel *SAITÔ Hidekatsu*, provis kombini la demokratiigon de la japana lingvo kun la internacia solidareco pere de Esperanto. Tiu ĉi pagis sian konvinkon per morto en karcerio dum la milito.

La granda atingo de la latiniga movado estas fina venko de la japanisma ortografio per la latina alfabeto en 1937 super la sistemo *Hepburn*. Ĉar ĝi estis promulgita per dekreto de la ministraro, ĝi nomiĝas la sistemo Dekreta (*kunrei*). Ĝi realiĝis, multe helpate de la insista postulo de doktoro *Tanakadate* en la Ĉambro de Nobeloj de la nacia (pardonon, imperia) parlamento, al kiu li estis selektita de imperiestra edikto pro sia merito en sia fako.

iii. LIMIGO DE ĈINAJ LITEROJ – INICIATIVO DE LA MINISTREJO DE EDUKADO

Aparte de tiuj du movadoj, daŭris provoj ne forigi ĉion, sed limigi la nombron de ĉinaj literoj ordinaraj uzataj. Unu el ties antaŭenpuŝantoj estis ĵurnaloj. Ili devis stoki grandan volumenon da tiparo pro la multeco de ĉinaj literoj.

Alia motivo por limigo de ĉinaj literoj estas edukado. Raportoj el klasĉambroj de deviga edukado (antaŭ la dua mondmilito: ses jaroj, dum la milito: ok, poste naŭ) rakontas enorman malfacilon por lernigi ilin.

Oni vidis multfojajn provojn de limigado, sed progresoj estis ĉiam akompanataj de retroiroj. La obstaklo venis el la konservativuloj, precipe la dekstruloj, kiuj ofte ĉantaĝis per akuzo pri lezo de majesteco ĉar imperiaj ediktoj estis en la klasikĉina stilo.

En tiu kampo, estis rimarkebla la gvida mano de la Ministrejo de Edukado, kiu okazigis nombron da serioj de provizoraj esplorkonsilioj pri la nacia lingvo.

Kiam la ministrejo okazigis sesion de la konsilio pri simpligo de ortografio, alia ero de lingvoreformo pri kiu mi parolos poste, *MORI Ôgai* esprimis sian kontraŭstaron el la vidpunkto de konservativulo, samspeca kiel iu ajn intelektulo en Okcidento (li fakte citis ekzemplojn el Eŭropo).

Japanio havas neniun Akademion kiajn havas multaj landoj, krom Britio kaj Germanio kiel maĵoraj esceptoj, kies prototipo estus la florenca *Accademia della Crusca* kaj la *Richelieu*-a *Académie française*. Anstataŭe, ĝi havas la konsiliojn, kies torĉo estas transportata post la milito fare de la konsilio pri la nacia lingvo. Rimarkinda estas la progresema rolo kiun ludis la ministrejo antaŭ la milito, kiam la potenco estis aŭtokrata, sed reverse de la medalo tio sekurigis la bonan saĝon kontraŭ neklereco de la plebo. Tio estas la granda aporio de la demokratio. Se pruvition analoge, en la plejparto de la civilizitaj landoj la mortpuno estas aboliciita (ĉar Japanio estas necivilizita lando, ĝi restas tie), sed se oni estus metinta ĝin al referendumo, la plimulto el tiuj landoj restus nun en barbareco. Tio ĝuste estas la merito de nereкта, aŭ reprezenta, demokratio. Ni vidos ke post la milito, sub demokratio, Japanio retroiris en la vojo de lingvoplanado fare de deputitoj zorgantaj la pulson de la elektantaro.

Estis iam ĉe la ministrejo burokrato en iu sekcio por la nacia lingvo, nomata *HOSINA Kôiti*. Li estis fakulo pri la japana lingvistiko, kaj estus povinta esti profesoro de prestiĝa ŝtata universitato kiam ajn li volis, kaj en realo li estis invitita fari tion, sed li rifuzis kaj postkuris sian celon de lingvoreformo, en limigo de ĉinaj literoj aŭ revizio de la ortografio. La registara decido pri la Dekreta sistemo en la latinlitera ortografio estis ebla, krom dank' al la agado de la latinigista asocio, klopodo de tiaj burokratoj.

Kaj tiu klopodo ne kuris kontraŭ la racio de la tuta reganta klaso, multe pli utila ol malracia spiritismo de dekstruloj. Unu ekzemplo estas tiu de kolonelo de artilerio *KÔNO Tatumi*, kiu plenumis ĝisfundan reformon de terminoj en la terarmeo, simpligante esoterajn vortojn en facilajn, kompreneblajn de rekrutoj konskripcitaj kun nur sesjara rudimenta edukado. Ĝi envolvis eĉ revizion de la tradicia ortografio en fonetikan, kio estis vere revolucia – ekster la muroj de barakoj ĝi estis tabuo. Li estis longtempa membro de la societo por kanaoj. La japana armeo havis saĝon toleri lin, tio surprizas. Tiu starpunkto estis adoptita en alia sfero de kaŝitaj kontraŭreĝimuloj: ili pretekstis la fortigon de batalkapablo de la lando por enkonduki raciismon en la malraccian japanan socion, volante utiligi tion por infiltrigi kontraŭmilitan agadon, ĉar la milito estas la plej malracia agado el ĉiuj. Historiografoj japanaj nomis ĝin teorio de produktivaj fortoj. La vortumo “Plifortigo de produktivaj fortoj” faris ofte unuapaĝan fraplinion en ĵurnaloj: tiu marksista termino fariĝis ĉiutaga vorto.

iv. KONTRAŬPARTO EN ĈINIO

Same kiel la parolstila movado, la abolicio de la ideografio eniris en tagordon en Ĉinio iom pli malfrue ol en Japanio.

Ĝi serioze komenciĝis post la abortigita burĝa revolucio de 1911. Sub la respubliko estis promulgita sistemo de fonogramoj nomata “sonnota alfabeto” (*zhūyīn zīmǔ*). La signoj estis alprenitaj el la radikalaj, tiuj konstrublokoj de ideogramoj, ĝuste kiel la japanaj *katakana*. Ĝi estis pli scienca ol la siatempe disvastigita latinlitera literumado surbaze de la angla, nomata sistemo *Wade* laŭ la inventinto. Antaŭ ĉio ĝi estis produkto de konsilio de specialistoj, kaj el tradiciaj elementoj. Ĝi estis uzata vaste en Japanio por edukado pri la ĉina por japanaj studentoj. La reakcio venis tuj. Tradiciuloj levis voĉon kontraŭan, kaj je ilia postulo la nomo estis ŝanĝita al “sonnota signo”. Ne temas pri simpla nomŝanĝo, ĝi ŝanĝis sian esencan karakteron. La nomado “alfabeto” volas diri ke ĝi estas aŭtenta sistemo de literoj, uzeblaj, uzindaj en okazoj kiam la lingvo estas skribata; signoj estas nur akcesoraj, helpaj, por indiko de prononco de ĉiu litero, kiel fonetikaj signoj. Tiamaniere, la unua provo por fonogramigo de la ĉina skribsistemo estis nanigita al difino de aro da signoj. La intenco de reakciuloj sukcesis.

Paralele estis decidita ortografio en la latina alfabeto, pretendata pli scienca ol tiu de *Wade*, titolita siaflanke “romigo”¹². Tiu ĉi ne populariĝis pro tro da precizeco.

Nesciate en centroj de potenco ĉinaj, evoluis alia sistemo de latinigo en Siberio inter ĉinaj elmigrintoj. Inventite de *Qū Qiūbái*, tiama sekretario de la Komunista Partio de Ĉinio, ĝi estis nomata “latinigo” aŭ “norda latinigo” pro tio ke ĝi konvenis por transskribi nordajn dialektojn, kies parolantoj abundis inter elmigrintoj. Tio rapide disvastiĝis pro sia facileco. Tio ĉi fariĝos la bazo de *Pīnyīn*, nuntempa oficiala ortografio en Ĉinio.

La latinigo ŝajnis nun oficiala lingva politiko de la komunistoj. Ĝi demonstris sian efikecon en forigo de analfabetismo. Jam antaŭe diris Lusin, la plej granda literatoro en la moderna Ĉinio, nomata la ĉina *Gorĵkij* (kvankam mi pensas lin pli granda ol tiu) kaj adorata eĉ dum la apogeo de la fifama kultura revolucio, ke se la ĉinaj literoj ne pereos, Ĉinio pereos. Oni propagandis ke ankaŭ *Máo* kaj *Zhou Enlái* subtenis tiun politikon. Post la venko de la ruĝa armeo super la naciista, latinigo marŝis ŝtorme. *Pīnyīn* estis decidita post longaj diskutoj. La ĉina registaro devigis ĝian uzon, ignorante proteston de fremdaj landoj, precipe Usono. Tiuj ĉi obeis. Estis agrable vidi ke arogaj okcidentaj potencoj riverencis antaŭ la aŭtoritato de la juna respubliko post tiel longtempa humiliĝo, io kion la naciista registaro neniel povis atingi. Tio faris elstaran kontraston kun la servila sinteno de la japana

registaro al la interveno en ĝian internan lingvan politikon fare de Usono pri la devigo de la ortografio *Hepburn*. Tiu eŭforio baldaŭ malaperos de la lingvopolitika sceno de Ĉinio.

II. Postmilita

a. MIELLUNO DE LA LINGVOPLANADO

La usona okupacio ekstartigis demokratiigon de ĉiu kampo de socia vivo en Japanio. Neregistaraj progresemaĵoj sin kaŝintaj sub la faŝismo elrampis el la subtero: la Esperanto-movado kaj la lingvoreformaj estis inter ili¹³.

La unua simptomo estis la imperia edikto de la novjaro de 1946. Ĝi estis interpunkciita! Ĝis tiam mankis ne nur al ediktoj sed al leĝoj kaj dekretoj interpunkcio, ĉar ili estis skribitaj en oficiala skribstilo, kiu estis jam ne tute en ĉinaj literoj, t.e. aŭtenta ĉina lingvo, kaj estis priintersemitaj per *katakana*, sed sen interpunkcio, leghelpilo ne taŭgas al ilia digno. Post tio, al ŝanĝo de stilo al la parola estis nur unu paŝo. Sekvis **parolstiligo** de ĉiuj leĝoj kaj dekretoj¹⁴. Mi diris ke la parolstiligo finiĝis ĝis 1910, sed mi ekskluzivis tiun vastan teritorion, kaj universaligo de la parola stilo devis atendi la kapitulacion de Japanio.

Limigo de la **ĉinaj literoj** estis proklamita: la listo de permesataj literoj entenis 1850. Ĉiuj registaraj dokumentoj devas esti skribitaj nur per ili. Novaj leĝoj kaj dekretoj observos saman limigon. Se iu vorto entenas eksterlistan literon, tiu estis skribita en kanaoj – ĉiuj ĵurnaloj kaj gazetoj ankaŭ. Estis nature ĉar antaŭ la milito ĵurnaloj estis unu el ties ĉefaj advokatoj. Kompreneble, la deviga edukado estis plenumita per la listigitaj literoj.

Granda progreso estis farata en tio ke poste la konsilio de la nacia lingvo anoncis duan liston konsistantan el 881 literoj el inter la permesataj 1850 literoj kiujn la lernantoj devis ne nur legi sed ankaŭ skribi, kio liberigis ilin de studo por skribi la literojn ekster la dua listo. Tiu apartigo de aktiva kaj pasiva posedo de scio pliefikigis edukadon tiel ke postmilitaj infanoj pli bone mastras ĉinajn literojn ol la antaŭmilitaj. Tamen, el la klasĉambroj aŭdiĝas ĝemoj de instruistoj ke eĉ tiel malmultigitajn literojn la infanoj ne povas ellerni. La societo por kanaoj publikigis antaŭ la milito liston de 500 literoj, kiuj estas laŭ ĝi la maksimumo instruebla.

Grandan kontraston faras la sinteno de literaturistoj kaj ĵurnalistoj kun tiu de iliaj avoj en la lasta jarcento, kiuj estis pioniroj en la reformo de la lingvo: ili plendas pri malsufiĉo de literoj. Ili diras tion nur laŭ sia gusto: unu havas obsedon uzi iujn literojn, alia havas diferencajn favorojn, kaj oni ne povus atingi la finon de la listo. *De gustibus etc.*

La **ortografio** estis reviziita al pli fonetika. La nova estis nomata “moderna literumo”, kaj ĝi jam enradikiĝis tiel profunde ke neniu reakcia politiko povus resurektigi la tradicion, kvankam multaj verkistoj klamas por tio. Unue, ili mem ne povas senerare literumi laŭ klasika sistemo. Tio ne riveligigas ĉar la ĉinaj literoj kaŝas ilian nescion.

Tio ĉi neniel estas speciala en Japanio, kaj estas simila al tiaj en eŭropaj landoj. La sola escepto estas la angla, se oni ne enkalkulas la reformon de literumo de la usona angla, iniciatita de *Noah Webster*. Japanaj konservativuloj kutimas citi Francion kiel modelon. La francoj, ili diras, amas sian lingvon kaj ne faras vandalismon kiel la japana konsilio de la nacia lingvo. La francoj havas protektanton de sia lingvo en la Franca Akademio ktp ktp. Ili en sia malklereco ne scias ke la politiko de la Akademio estas neniel konservativa, ekz. *rhythme* fariĝis *rythme* tiel frue kiel 1878 dum la angla kaj la germana retenas la helenan aspiraton en *rhythm*, *Rhythmus*.

Horizontala skribado konkeris en lernejoj ĉiujn disciplinojn krom la japana, kaj en oficejoj, inkl. de la registaraj, kvankam en populara kulturo, kia ĵurnalismo, la vertikala akaparas la terenon, speglante la konservatismon de la amaso.

Tiamaniere faris grandajn paŝojn la lingvoplanado gvidata de la konsilio. Tamen **reakcio** komenciĝis ĉirkaŭ la 1960-aj. Ĝi estis rekte startigita en 1961 de la histriona ekziĝo de la romanisto *HUNABASI Seiiti* kaj kvar aliaj el la konsilio, protestante ĝian porreformatan tendencon. La ministrejo rekomisiis membrojn, sed la plimulto estis jam konservativuloj, indiferentaj pri la reformo. Tiu evento tamen estis nur surfaca fenomeno. Malkontento de literaturistoj estas jam konata afero, sed tiu puĉo sukcesis pro la ŝanĝo de politika atmosfero. La vera reĝisoro estis la komitato de la politiko pri edukado de la reganta Liberaldemokrata Partio. La burokratoj timas deputitojn pli ol iujn ajn aliajn. Ilia kariero estas regata de tiuj ĉi. Politikistoj estas la plej reakcia raso inter la japanoj, sed tio nur estas respugulo de la japana socio, kies plej primitiva, plej azia parto estas eksterproportie grande reprezentata fare de la tordita asignado de deputitoj al elektodistriktoj.

b. KONTRAŬATAKO

La unua kontraŭatako estis **pligrandigo de la listo** de la permesataj literoj: nun la pasiva listo entenas 1945 kompare kun la antaŭaj 1850 kaj la aktiva 1006 anstataŭ la antaŭaj 881. Tio jam estas granda retreto, sed pli fatala estis la ŝanĝo de la baza principo. La malnova listo ne estis deviga al privataj sektoroj. Privatuloj povas uzi tiom multajn literojn kiom al li plaĉis, literaturistoj do ne devas timi la liston, al li ekzistis nenia restrikto, sed ili ŝajngis ke tiel estas, kaj volis reformi la tutan socion laŭ siaj imagoj. En la progresema periodo de la konsilio, la listo

estis deviga nur por registaraj dokumentoj kaj deviga edukado. Nur tio. La reakciuloj sukcesis aldoni al la nova listo noton dirantan ke tiu ĉi montras malstrikantan gvidlinion. Tiu noto estis interpretita ke poste ne estos limigo. Bakĥanalio ekis. La ĵurnaloj libere laŭ plej kaprica gusto de ĉiu raportisto uzas iun ajn literon, kvankam registaraj oficejoj kaj lernejoj ankoraŭ observas la plilarĝigitajn listojn. La listo povas esti pligrandigita iun ajn momenton laŭ postulo de konsilianoj. Neniu serioze pensas pri la listo.

Alia tereno kie granda retroiro estis farita estas tiu de edukado de kaj per la **latinaj literoj**. La lingva reformo postmilita envolvis ĝin kiel integran parton. Instaligis latinliteraj klasoj tra la lando por testi ties efikon, simile al eksperimentaj klasoj por pruvi la propedeŭtikan valoron de Esperanto. Kaj ili ja pruvis ĝin. Infanoj lernis ĉinajn literojn kaj kanaojn en la lecionoj de la japana, sed aliajn disciplinojn, geografion, natursciencan ktp, sole en latinaj literoj. Ili akiris pli bonan konon ol tiuj edukitaj sub la normala sistemo. Tiu valora eksperimento estis baldaŭ forĵetita. Nun oni diskutas en la rubriko de Leteroj al la Redaktoro de grandaj ĵurnaloj la valoron de instruo de la latina alfabeto entute. Ĝi estas senutila, leganto skribas, utila nur por legi latinliteran indikon por fremdlandanoj de nomoj de fervojstacioj. Alia: ĝi malutilas por posta lernado de la angla prononco!

Mankas la konscio ke la latinaj literoj estas parto de la japana skribsistemo kaj ne fremdaj literoj. Esperantistoj ne estas escepto: multaj literumas sian nomon per Esperanta ortografio. Ili pensas ke la latinaj literoj estas uzataj nur kiel piednoto al japanaj propraj nomoj, do ne literoj sed signoj. Ili neniam vidis latinajn literojn uzatajn por artikoloj aŭ libroj, eĉ ne unu frazon kun ĝia predikato, sed nur substantivoj, eĉ ne tiuj, sed propraj nomoj utilaj por turismo. Kaj ili akuzas latinigistojn, dirante ke oni ne povus legi rapide latinliterajn dokumentojn, ne konsciaj pri la absurdeco de komparo de rezulto de dekoj da jaroj de ekzerco legi la ĉinliterajn kaj kanaajn kun tiu de lego de kelkdeko da substantivoj.

Konklude oni povas diri ke en Japanio institucio de lingvoplanado ekzistas en la konsilio por la nacia lingvo kun sufiĉe granda kompetento, sed nun ĝi faras malmulte da planado kaj interesiĝas nur en restaŭro de la malnova reĝimo. Tio bezonas nenan iniciateman lingvopolitikon. La heroa epoko de la Reformo apartenas al la historio.

Kio do pri civila **volontula organizo** por lingvoplanado?

Ili ne povas fieri nun pri io memoriganta elanon de malnovaj tagoj. La societo por kanaoj vegetas kun malpli ol 200 membroj kompare kun 10 000 en prosperaj tagoj. Tiu por la latinigo ĉirkaŭ 400. Komparu kun la membraro de la Japana Esperanto-Instituto de 1400, kiu ankaŭ ne estas feliĉiga sed iom pli bona.

La ĉefa kialo estas simpla: la celoj de antaŭmilitaj movadoj estis jam atingitaj malgraŭ lastatempa retreto.

Unu granda motivo por la abolicio de ideogramoj perdiĝis: tio estas disvastigo de tekstoprilaboriloj. Antaŭ la epoko de komputiloj, tajpado de la japana estis nepensebla sen forigo de la ĉinaj literoj, sed nun tiu problemo estas solvita. Japanio eniris el la mezepoko de la oficeja laboro (ĉiuj dokumentoj estis manskribitaj krom malmulte da tiuj kun ceremoniaj karakteroj skribitaj per helika tajpilo!) en la modernan epokon kun la enkonduko de personaj komputiloj. Oni demandas pompe kio estas la uzo de lingva reformo nun ke tiu temo estis finfine solvita. Tio estas malvero ĉar la problemo restas: la japana postulas dubajtajn tekstoprilaborilojn pro la ĉinaj literoj dum en latinliteraj lingvoj unu bajto sufiĉas. La kvazaŭmonopoligo de la japana merkato fare de NEC estis ebla pro ili kvankam ĝi estas nun minacata de DOS-V.

Estonta lingvoplanado devas reveni al la fundamenta, propre lingva principo, sin liberigante de la movado por la raciigo de produktado kaj komerco. Nome, lingvoplanado por la lingvo, pli konkrete, korekto de la nuna stato kie la propra vortoprovizo estas difektita de la invado de la ĉina. Tiu ĉi havas komplikajn foneman sistemon, multe pli komplikajn ol la japana, kaj se citi nur malmulte da ekzemploj, la sono “t” en la japana respondas al la aspiracia kaj neaspiracia en la ĉina, kaj “ĉ” al aspiracia kaj neaspiracia kaj retrofleksa kaj neretrofleksa, kaj ĉina silabo havas kvar tonojn kiujn la japana ne konas, t.e. dek ses ĉinaj silaboj fariĝas nur unu sama japana. Oni facile povas supozi ke tio kondukas al amaso da homonimoj ĉindevenaj. Japanaj frazoj ne estas kompreneblaj sen helpo de skribado – la japana estas tute lama lingvo, kiu ne povas marŝi sen bastono. Kaj ĉar oni povas senpripense kombini ĉinajn literojn por krei novajn vortojn, homonimoj kaj nekompreneblaj vortoj multiĝas kun granda rapideco. Ĝi ne estas homa lingvo, sed sistemo de signoj. Oni dirus ke forigo de ĉinaj literoj estas ebla nur post elimino de homonimoj, sed tio estas inversigo de la meto de problemo. Oni povas elimini homonimojn nur per abolicio de ĉinaj literoj.

Ni havis grandan ŝancon por ke la japana sin metu sur la larĝan ŝoseon de la ĉefa fluo de internacia kulturo. Tio estis fine de la 16-a jarcento kiam jezuitaj misiistoj priskribis la prosperon de sia seminario en *Azuti*, proksime de Kioto, ĉefurbo de *ODA Nobunaga*, kiu, kvankam li mem estis ateisto, favoris kristanojn pro sia malamo de la degenerintaj budhismaj pastroj kun sekularaj grandegaj riĉeco kaj potenco. Li pereis pro la ribelo de sia generalo sur la vojo al unuigo de tiu ĉi lando post centjara periodo de interna milito. Se li pli longe vivus, la japana nun ĝuus komunan leksikon kun la eŭropa civilizo de helena-latina tradicio! Tiam nia malfacilo ekposedi Esperanton estus eta ono de tiu kiun ni spertas. Jen tute malscienca fantazio.

Ĉu neregistaraj organizoj povos plenumi tian taskon? Ne. Ili ne povas atendi la finan venkon, konsiderante la indiferenton de la resto de la amaso kaj senpovecon ilian, kaj ne eblas raŭmismo, ĉar ilia komunumo estas mikroskopa.

Ilia tasko estus esti tabano pikanta konsciencon de la publiko, esti salo de la tero. Mi miras aliparte la indiferenton de esperantistoj pri la lingva problemo de sia propra lingvo kaj tiu de lingvoreformistoj pri la internacia lingva problemo, kvankam certe ekzistas multaj kazoj de koincido.

SUPLEMENTA RIMARKO PRI LA FAKAJ TERMINOJ

Paralele kun la konsilio, alia institucio por lingvoplanado estas tiu de terminara laboro, precipe tiu por oficialigi japanajn industriajn normojn (JIS, ekvivalento de DIN kaj ASA) kaj eldonado de sciencaj terminaroj sub la aŭspicio de la Ministrejo de Edukado. En Japanio, ĝi nedisigeble kunplektiĝas kun la lingva problemo, ĉar, kvankam la listo de permesataj ĉinaj literoj perdis iaman aŭtoritaton, fakuloj ne povas ignori ĝin. Unu bonaĵo estas ke ili observas la oficialan latinan ortografion, antaŭ ĉio la ekzisto mem de latinliteraj indikoj apud la ĉinliteraj. Tio klare manifestas ke la latinaj literoj ne estas fremdlanda afero sed parto de la nacia skribsistemo.

La nuna stato de terminologio estas tute malkontentiga por fonogramistoj.

Kiam iu termino entenas eksterliman literon, sin prezentas du rimedoj: aŭ traduki en indiĝenan japanan vorton, kio estas la plej bona; aŭ anstataŭigi ĝin per vorto entenanta nur enlimajn literojn. En la plimulto de la okazoj, fakuloj alprenis la duan. Tio estis farita kun ekstrema facilanimeco: ili kreas novan kunmetaĵon per ĉinaj literoj. La nova vorto estas nekomprenebla sen rigardi la literojn. Tiaj neologismoj pletoras. De temp' al tempo, ili adoptis trian vojon. Tio estas lasi enlistajn literojn kaj skribi eksterlistajn literojn per kanaoj. Tio estas due plej bona metodo, manke de indiĝena vorto, por fonogramistoj, ĉar la vorto jam havas jarcentan au duonjarcentan historion kaj estas aŭtomate komprenebla nur per simpla aŭdo sen rigardi la literojn. Tio tamen estas turmento por tradiciistoj, neeltenebla pro ĝia malbela surfaca aspekto, mikspoto de ĉinaj literoj kaj kanaoj en unu termino, kiu estas aŭtente ĉiam skribenda en ĉinaj literoj. Tiamaniere oni substituis sone strangajn novajn terminojn al la malnovaj maturiĝintaj. Mi proponadas kvaran vojon: alpreni de internaciaj terminoj helenaj-latinaj. La idealeo estas havi duoblaĵon de indiĝena kaj internacia terminoj, ĝuste kiel en la germana, ekz. *Volkswirtschaftslehre* apud *Ökonomik* [ekonomiko], kaj ankaŭ en Esperanto, “birdoscienco” kaj “ornitologio”. La kverelo inter skemistoj kaj naturalistoj tial malaperas, ambaŭ kontribuante al la riĉeco de nia lingvo.

La plej granda noco ĉi-koncerne estas la angla. Pro la anglalingvomanio, angle torditaj prononcoj invadis la japanan: la japana terminologia asocio jam infektiĝis. Ekzistas japana vorto por terminologio, sed oni vidas pli kaj pli ofte sur la organo de la asocio, la vorton *tâminorozî*. Mi persiste uzas la formon *teruminorogî*, kiu ne havas la alrespondon unu al unu kun *terminologî*, sed jes ekzistas la inversa, t.e., ne troviĝas biunivokeco inter la du, sed jes univokeco flanke de la dua. Kial “er” estas “â”? kaj “gi” “zi”?¹⁵ La angla estas la plej maldezirinda lingvo por esti internacia: la literoj *a, e, i, o, u* ne prononciĝas *a, e, i, o, u*. Aliaj membroj absolute ne komprenas mian rezonadon.

c. KIEL EN ĈINIO?

La latiniga movado ŝajnis marŝi rapide. La dubigaj signoj tamen komencis aperi sporade. Certe, *Zhou* diradis ke la fonetikigo de la literoj estas farenda, sed ke ĝi bezonas tempon, kaj ke oni devas fari tion kiom ajn da tempo necesus.

Kiom longa tamen estus tiu tempo? Laŭgrade oni ekkonscias ke tiu tempo estas eterne nevenonta. Kiam ni vizitis Pekinon por la Universala Kongreso en 1986, stratindika tabulo ne ĉiam estis akompanata de latinaj literoj. Latinaj literoj troviĝas tra la tuta paĝaro de ĵurnaloj nur en la kolofono. Sur la muro de la redakto de la ĵurnalo *Guangming Ribào* (“Ĵurnalo Lumo”) estis ŝildo en la angla, *Guangming Daily!*

La Komitato pri la Reformo de la Lingvo (*Yŭyán gaigú wèiyuánhùi*) ŝanĝis sian nomon al simple Lingva Komitato. Ĉio sugestas haltigon de la movado.

Oni eksciis ke la ĉina registaro rigardas la latinan alfabeton kiel fonetikajn signojn. Ĝi neniel celas la fonetikigon de la ĉina. Eĉ esperantistoj ne havas konscion pri la problemo – la esperantistoj kiuj en la pasinteco koincidis kun latinigistoj – kiel *Hú Yúzhì* kaj *Yè Làishì!*

La ĉina kunlaboranto al la *Maul-a Deklingva manlibro pri politiko* asertis skribi ĉinajn terminojn en ideogramoj, kio igus la prezon netolerebla, kaj kiam mi provis persvadi ŝin rezigni, eksplikante la historion, ŝi eĉ ne respondis. Ŝajnas ke ŝi estas absolute nescia pri la glora historio de sialanda lingvoplanado. Manko de kono pri la lingva problemo en sia ĝardeno kunekzistas kun sentemo pri la najbara, la internacia lingva problemo.

En la *Manlibro* ĉinaj kaj japanaj terminoj estas skribitaj en latinaj literoj, kaj kiu sin ĝenas konsulti ĝin pri ili havas nenian malfacilon rekonstrui la originalajn ĉinajn literojn; tio signifas ke termino estas bona, komprenebla nur per simpla aŭdo sen litera lambastono. Nur tiuj kiuj ne studis la ĉinan kaj la japanan ne povas fari tion, kaj ili devas ne konsulti la leksikonon dekomence.

Cunctatores [malfruiguloj] ĉinaj dirus, citante *Zhou*, ke oni devas ne tro hasti, sed oni povas sen ia ajn damaĝo al la kulturo ĝenerale. Ili nur imitu la japanojn kaj uzu latinajn literojn por skribi funkciajn vortojn (jes, la ĉina havas tiujn ĉi, tute aglutin-lingve).

La ĉinaj komunistoj komplete forgesis sian historion pri lingvoplanado en Ĉinio. Tiu konservativismo en la kulturo de pretendata progresema skolo ne limiĝas al la ĉinoj. Japanio havis influhavan proletan Esperanto-movadon antaŭ la milito. Post la milito, dum kelka tempo ne estis konata la persekuto en Sovetio. En la eŭforio post la falo de la faŝismo troviĝis amikeco inter Esperanto kaj la laborista movado. En la programo de la laborista-terkulturista partio (maldestra alo de la socialista partio sendependiĝinta) estis ero pri Esperanto. La teoria organo de la komunistoj portis sur la kovrilo titolon *La Avangardo* apud tiu en ĉinaj literoj. Kiam delegacio de la monda federacio de laborsindikatoj vizitis la subokupacian Japanion, okazis mitingo sur la placo antaŭ la imperiestra palaco, kie sur la podio legiĝis en Esperanto, “Proletoj de ĉiuj landoj unuigu vin!”

Tiu mielluno subite malaperis. La komunistoj discipliniĝis stalinisme. Titolo enesperanta vanuis. Ne nur tio, ili tute konservativiviĝis ankaŭ en la lingva politiko. La titolo de la tagĵurnalo de la komunistoj iam estis *Akahata* (“Ruĝa flago”, imite al *Rote Fahne* de KPD, subtera eldonaĵo de post la 1930-aj jaroj, postmilita laŭleĝa) en *katakana* kaj latinaj literoj, kun neniuj ĉinaj literoj. Post kiam la domino de *MIYAMOTO Kenzi* estis certigita, la titolo ŝanĝiĝis en ĉinajn literojn! Ek al la antaŭmilita stilo. La nun aboliciita nova stilo rezultis el konsiliĝo kun la ĝenerala sekretario de la societo por kanaoj *MATUSAKA Tadanori*. Ties konsilon la partio unue tute sekvis, eĉ la skribado de ĉiuj personnomoj en *katakana*, kio tamen estis haltigita responde al plendo de la legantoj. La popolo estas konservativa, kaj la “avangardo” forĵetis sian taskon eduki la amason kaj flatis ties tradiciismon. Bagatela sed rivela ekzemplo estas ĉesigo de senkadrĵaj paĝoj, ordinaraĵo inter fremdlandaj ĵurnaloj, kaj repreno de kadroj rande de paĝo, partikularaĵo de japanaj ĵurnaloj.

La konservativismo de komunistoj en la kulturo estas rekonebla jam en Sovetio. *Marc Chagall* kaj *Kandinsky* agadis ĉe bolŝevikaj registaraj instancoj: nepenseblaĵo sub Stalino.

NOTOJ

1. Ĝi jam invadis la redakcion de la organo de la Japana Esperanto-Instituto, *La Revuo Orienta*.
2. La japana dividiĝas en du grandajn dialektojn: la ĉefarĥipelaga kaj la okinava; la unua en la orientan kaj la okcidentan, kiu entenas du variantojn: la kansaja kaj la *kyūsyūa*. Mi kreskis en tipe supraŭrba medio tiel ke mia lingvaĵo devas esti norma, sed miaj gepatroj estas kamparanoj el *Kyūsyū*, pro kio mi iujn fojojn eraras en akcento de iuj nekutimaj vortoj.

3. *Ŝvebaj nuboj*, 1887, pri kiu ne ŝparis laŭdon *MORI Ôgai*, alia el la kreintoj de la moderna japana literaturo kun profunda erudicio en la germana kulturo. Li atingis la pinton en la kariero registara kiel ĉefinspektoro de militkuracistoj, sed liaj literaturaj agadoj havas nenion por fari kun lia kariero, al kiu li tenas ambiguajn rilatojn, kiel grafo *Mosca de Stendhal*.

4. En 1906. Lia klereco estis en la rusa, kaj li ekiris de la traduko de la rusa literaturo.

5. Tiu epiteto ne estas simpla geografia nomo sed implicas rigore sciencan historian kategorion Marksan kaj Hegelan.

6. En 1867, la ŝoguno transdonis la suverenecon al la imperiestro, loĝanta en Kioto, en demarŝo nomita poste tia laŭ la nomo de la regad-periodo (stulta azia institucio) de la ĵus surtroniĝinta juna reĝo.

7. Konata kiel enkondukinto de moderna poŝta sistemo en Japanion.

8. Eminentaj ekzemplo estas *ARAI Hakuseki*, granda politikisto kaj fakulo pri konfuceanismo, kiu estis sekretario de ŝtato de la dekokjarcenta ŝoguno.

9. Profesoro *ÔNO Susumu*, unu el la ideologoj de la reakcia skolo en la lingvoplanado, diras ke tiu kiu povas konscii el ĝiaj cititaj ekzemploj pri tio kiel timinspira vortaro *Genkai* estas povas esti nomata konanto de la japana.

10. KLEG, unu el la bastionoj de la japana Esperanto-movado, estas la siglo de Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj. Ĝi kreskis el la klimato kun riĉa heredo de laboristaj movadoj, spegulante la tieajn evoluintajn industriojn, sub la gvido de la nun legenda *MIYAMOTO Masao*.

11. La japana estas skribata sen divido de frazoj en vortojn ĉar en la japana enhavaj vortoj estas skribataj en ĉinaj ideogramoj dum funkciaj vortoj, kiel dezinencoj kaj postpozicioj, en kanaoj tiel ke la delimitacio inter vortoj estas evidenta, nenecesigante interspacon inter vortoj, sed forigo de ideogramoj faras nemalhavebla krei regulojn por dividado en vortojn, kiuj antaŭsupozigas gramatikon provizantan teoriantan bazon.

12. Envere, japanaj movadoj por latinigo estis kaj estas nomataj “romigo”; mi pragmate uzis la terminon “latinigo”.

13. Mirige estas ke ili ne estis persekutataj tiel severe kiel supozate. Japana Esperanto-Instituto tenis sian oficejan konstruaĵon senvundita malgraŭ aeratakoj. La deĵoranto *MIYAKE Sihei* ne estis arestita, la Esperanto-domo ne konfiskita. Same pri la societo por kanaoj kaj la societo de romaj literoj. Estis frustrate ke la ĝenerala sekretario de la kana-societo, *MATUSAKA Tadanori*, estos arestita pro sia libro, *Esenco de la problemoj de la naciaj literoj*, en kiu li proponis parolstilon de leĝoj kaj nur pasante tuŝis la imperian konstitucion, dirante ke oni lasu ĝin senŝanĝa “provizore”. Pri tiu adjekto la politika polico levis suspekton ke *Matusaka* intencas reviziigi la netuŝeblan konstitucion iam en estonto: lezo de majesteco. Li tamen ne estis enprizonigita, kaŝinte sin, laŭ onidiro, ĉe amiko.

14. Ekzistas esceptoj: la parto pri la statuso de la civila kodo estis reviziita sekve de la abolicio de la patriarĥia institucio de la domo kaj enkonduko de la principo de egaleco de seksoj, sed la parto pri la proprieto restis nereviziita, ĉar ne okazis ŝanĝo en romjuraj institucioj pro la malvenko de unu milito, kaj la malnova skribstila leĝo restis. Ankaŭ la kriminala kodo.

15. Tio estas neevitebla se oni transliterumas anglajn sonojn en la japanan: la japana havas multe pli malmultajn sonojn ol la angla.

Lingvoplanado en la (nov)hebrea

AMRI WANDEL

1. Enkonduko

La hebrea lingvo parolata en Israelo prezentas senprecedencan fenomenon. Antikva lingvo kiu dum jarcentoj estis efektive morta, servanta nur por preĝo kaj uzata por legi kaj studi la sanktajn librojn, reviviĝis, kaj tuta popolo ĝin parolas kiel ĉiutagan lingvon. Kvankam lingvistoj ĝin nomas nov-hebrea, la hebrea lingvo nuntempe parolata en Israelo apenaŭ diferencas de la antikva hebrea lingvo, la lingvo de la biblio. Kompreneble ĝi havas multajn novajn vortojn, sed la baza sintakso kaj vortprovizo estas la samaj (tamen la skribo – la alfabeto – estis alia).

2. Evoluo de la hebrea

La hebrea lingvo nomas sin *ivrit* – kiu signifas “la lingvo de la alia bordo de la rivero”. En la biblio tio estas la nomo por Mesopotamio, el kiu venis Abraham. Tamen laŭ la lingvika klasifiko la antikva hebrea apartenas al la grupo de okcidentaj semidaj lingvoj, kaj ne al la orientaj, mesopotamiaj. Por kompreni la fontojn el kiuj la novhebrea estis ĉerpita, necesas koni la lingvan originon de la hebrea, ĝian evoluon en la antikva tempo kaj ĝiajn parencajn lingvojn: la araban kaj la aramean, el kiuj la hebrea prenis multajn vortojn. La semidaj lingvoj dividiĝas al tri originaj grupoj: la orientaj semidaj lingvoj parolitaj en Mesopotamio (kiuj originis de la antikva akada), la nord-okcidentaj semidaj kaj la sud-okcidentaj. El la akada evoluis la babelaj kaj la asuraj. El la nord-okcidenta, la aramea, ugarita kaj kanaana lingvoj (el la lasta fontis la fenika kaj la hebrea); kaj el la sud-okcidenta, la araba kaj la amhara. (Interesa aspekto pri la ĉi-lastaj lingvoj estas ke pro la enmigrado de falaŝoj, anoj de la juda komunumo en Etiopio, al Israelo, kreiĝis en Israelo granda grupo de parolantoj de la amhara lingvo, kiu povas influi ankaŭ la hebrean). La antikva hebrea plu evoluis tra la biblia hebrea, la talmuda hebrea (en kiu estis skribitaj la Miŝnao kaj la Talmudo, en la helena kaj romia epoko; en ĝi oni trovas fortan influon de la aramea), la mezepoka (kiu evoluis kaj postlasis gravajn verkojn ĉefe en la “ora tempo” de la judoj en Hispanio, absorbinte multajn vortojn de la hispana kaj araba), ĝis la novhebrea.

3. Renoviĝo de la hebrea lingvo

Kune kun la renoviĝo de la juda popolo en la antikva hejmlando de la hebreoj, kaj kun apero de la cionista movado en la dua parto de la pasinta jarcento, la enmigrintoj volis vivi ankaŭ la antikvan lingvon, la hebrean, kaj ekuzi ĝin kiel ĉiutagan lingvon. La tasko estis tre granda kaj malfacila: oni devis ponti la gigantan breĉon de jarcentoj da kultura kaj teknika evoluo, dum kiuj la hebrea lingvo restis skriba, preĝlingvo. Oni devis adapti ĝin al la daŭre ŝanĝiĝantaj kaj kreskantaj bezonoj de la moderna mondo. Ankaŭ la novhebrea havas sian Zamenhof: granda parto de la novhebrea estas la verko de unu persono, Eliezer Ben-Jehuda. Li inventis kaj novigis milojn da vortoj por la modernaj terminoj, ĉerpante el la fontoj de la hebrea lingvo: por multaj novaj terminoj li uzis bibliajn radikojn. Ekzemple por la vorto elektro li proponis *ħašmal*, kiu aperas en la biblio nur unu fojon, kun ne klara signifo, por priskribi la aspekton de anĝelo en la libro de Jeĥezkelo. Tiu vorto civitaniĝis en la novhebrea kaj fariĝis la radiko de pluraj vortoj ligitaj al elektro. La verko de Ben Jehuda estis daŭrigita dum la dudeka jarcento, kaj ankaŭ nuntempe – novaj vortoj estas daŭre kreataj kaj aldonataj al la lingvo. Kvankam tiu renoviĝo kaj adaptiĝo okazas ankaŭ en aliaj lingvoj, en la hebrea tiu procezo estas tre intensa kaj rapida, ĉefe pro du faktoroj: la enmigrado kaj la armeo. Krome sed ne laste, kiel en multaj aliaj landoj nuntempe estas intensa influo de la usonaj kulturo kaj lingvaĵo, precipe sur la junularo kaj per la profesia lingvo.

4. La enmigra kaj arma influo

Ekde la fino de la deknua jarcento, sed multe pli dum la dudeka, venis al la lando pluraj ondoj da enmigrantoj, el tre variaj kulturoj, landoj kaj mondopartoj. Ili alportis la kulturon de siaj devenlandoj, ĉu de Okcidenta kaj Norda Eŭropo, ĉu de Orienta Eŭropo (Rusio kaj Pollando – ĉiuj tiuj judoj nomiĝas “aŝkenazoj”), ĉu de la mediteranea regiono aŭ Nordafriko (sefaradoj). Ofte lingvoj absorbas kaj adaptas fremdajn vortojn dum sia natura evoluo, sed la evoluo de renoviĝanta hebrea lingvo estas pli rapida kaj same la absorbo de fremdvortoj, kiuj originas de etnaj grupoj loĝantaj en Israelo kaj parolantaj la hebrean lingvon. La lingvoj kiuj tiel plej forte influis la evoluon de la hebrea en la lastaj jardekoj estas la jida, germana kaj rusa ĉe la aŝkenaza flanko, kaj la araba, hispana kaj ladina ĉe la sefarada. En la lastaj jaroj okazis granda enmigrado de la antaŭa Sovetunio, kaj sekve oni multe aŭdas la rusan en Israelo, kiu neeviteble ankaŭ influas la evoluantan ĉiutagan hebrean lingvon. Tio kvazaŭ fermis cirklon, ĉar la origina lingvo de multaj

el la unuaj enmigrintoj en la pasinta jarcento estis la rusa, kaj ĝi influis ankaŭ la eknoviĝantan hebrean lingvon de tiu frua epoko.

Dum la trijara servperiodo en la israela armeo kreiĝas inter la samrotanoj speciala etoso kaj ofte ankaŭ ĵargono. Okazas ke novaj slangvortoj, mallongigoj kaj esprimoj uzataj en la armeo disvastiĝas al la ĝenerala lingva komunumo kaj enradikiĝas en la lingvo. Ekzemple, ĉu vi povus diveni kion signifas la akronimo TEVP (en Esperanta traduko)? Ne estas la nomo de iu tutmonda Esperanto asocio... En la hebrea ĝi estas Z. B. Ŝ., aŭ Zabaŝ, kiu estas vokaligita akronimo de la frazo “Tio estas via problemo”, nome “Tio ne estas mia zorgo”: “Vi plenumu la taskon, kaj via planita ekskurso – nu, TEVP!”

5. La Akademio de la Hebrea Lingvo

Por normigi kaj plani la kreskon de la lingvo, por proponi novajn vortojn laŭ la bezono kaj por provi direkti la kreskon estis fondita la Akademio de la Hebrea Lingvo (AdH). Fondita en 1953 laŭ registara leĝo, AdH respondecas ankaŭ pri la esploro de la hebrea lingvo en ĉiuj epokoj kaj direktas la lingvan evoluon teorie kaj praktike. AdH havas ĝis 23 membrojn – gravaj esplorantoj de la hebrea lingvo kaj verkistoj. La laboro de AdH estas farata en komisionoj, inter ili komisionoj pri fakaj terminoj. Grava projekto de AdH kiu estas unika al la hebrea lingvo estas la vokaligo de la hebrea: tradicie la hebrea lingvo havas nur konsonantajn literojn, kaj la vokaloj estas markitaj pere de specialaj signoj – konsistantaj el punktoj kaj streketoj, skribitaj sub kaj super la literoj. Krom en libroj kaj gazetoj por novaj lernantoj de la lingvo, oni apenaŭ uzas la vokalajn signojn – kaj tiam, por faciligi la legadon oni uzas ortografian sistemon kiu nomiĝas “plena ortografio”: oni aldonas kelkloke literojn kiuj servas kiel vokaloj, kaj indikas la ĝustan elparolon. Tiu sistemo estas relative nova, kaj ofte ne ekzistas firmaj reguloj kiel enmeti la vokalajn literojn.

AdH faras multajn proponojn kaj rekomendojn pri novaj vortoj kaj terminoj, sed pluraj restas kiel lingvaj kuriozaĵoj kaj ne estas akceptitaj. Fama tia ekzemplo estas la hebrelingva termino por telefono – *saĥ-raĥok* (laŭvorte: malproksimparolilo), kiu ne estis akceptita: ĉiuj plu uzas *telefon*. Same kiel en Esperanto, la fina decidanto ĉu iu vorto akceptiĝas aŭ restas kuriozaĵo estas la parolantaro, la amaskomunikiloj, kaj la verkistoj.

Novaj defioj antaŭ la Akademio de Esperanto

WERNER BORMANN

Komenco kaj kontinueco

Zamenhof konsilis al la lingvouzantoj, kaj liajn konsilojn ni trovas (kaj daŭre uzas) en la libro *Lingvaj respondoj*. G. Waringhien skribis: “*Lingvaj respondoj* aperis [...] inter 1889 kaj 1895 [kaj] dum du jaroj (1906-1908) ĝis la kreo de la Gramatika Sekcio en la Akademio, al kiu li oficiale konfidis la solvon de ĉiuj tiaspecaj problemoj” (Zamenhof 1962: v). Nur ĉar tiu sekcio unue ne kontentige funkciadis, li daŭrigis sian konsiladon tamen nur dum du pluaj jaroj.

Tiu ĉi Akademio estas bazita en la Fundamento (ĝia antaŭparolo) de 1905 kiel “ia aŭtoritata institucio” (Welger 1993: 4). La tagon post akcepto de la Bulonja Deklaracio, la Unua Kongreso fondis “Lingvan Komitaton”, el kiu evoluis en 1908 la Akademio de Esperanto (Albault 1987: 27).

Ke “Zamenhof komprenis la neceson de organismo, kiu povus respondi anstataŭ li, kiu ankaŭ povus solvi dubajn punktojn” (Albault 1987: 23), estis ne memkomprenebla. Schleyer lanĉis en vortaro de 1898 sian “plej gravan komunikaĵon kaj peton”, ke nur li, la “*datikel*”, rajtas enkonduki novvortojn: al “la sinjoroj akademianoj de Volapuko” restis la tasko pripensi vortojn komunikotajn malpublike al li kaj li decidis (Schleyer 1898: x-xi).

La Akademio de Esperanto do havas la taskon ekde 1905 zorgi pri lingvaj demandoj pri Esperanto. Tio estis transdonita al ĝi de Zamenhof mem kaj de la unuaj esperantistoj, ago samsignifa kiel la starigo de la Fundamento. Tial la Akademio de Esperanto estas partoprenanto en la lingvopolitiko pri tiu ĉi internacia lingvo, kaj prave ĝi prezentigas en tiu ĉi seminario pri lingvopolitiko.

Normo kaj decidgamo

La lingvopolitiko de la Esperanto-movado devas teni la internacian lingvon en stato, en kiu ĝi povas ekfunkcii en sia antaŭdestinita rolo kiel mondlingvo en la (nun tute ne konata) momento de sia oficialigo pro plurŝtata konvencio. Por tio la lingvo devas esti kaj evoluinta kaj stabila. Stabileco rezultas el konsekvenca sekvado al mem fiksita normo.

La lingvo estas difinita kiel la lingvo de la Fundamento de Esperanto. Tio estas ja korekta sed iom malvasta priskribo, kaj ĝi enhavas la malfacilecon kapti la lingvan evoluon. Tre taŭga difino de la lingvo troviĝas en la statuto de la plej granda esperantista organizaĵo, Universala Esperanto-Asocio (UEA), al kiu ĝiaj landaj asocioj (kaj multaj fakaj asocioj) estas alrokroĉitaj.

La statuto de UEA preskribas kiel sian lingvon en artikolo 6: *La oficiala lingvo de UEA estas la Internacia Lingvo Esperanto tia, kia ĝi estas difinita per sia Fundamento, per la verkaro de ĝia iniciatinto Zamenhof kaj per la ĝenerala lingvouzo kontrolita de la Akademio de Esperanto* (Jarlibro 1980: 20). Tio estas bona priskribo de la normo de Esperanto, kun la Fundamento kiel bazo kaj detaligitaj interpretadoj surbaze de la lingvouzo de Zamenhof, kaj lastvice kun iu lingva evoluo, tiu ĉi tamen sub kontrolo de la Akademio. Tial necesas respondo al la demando, kiel la Akademio plenumu siajn taskojn.

La statuto de la Akademio postulas “fidelecon al la Fundamento” de ĉiu unuopa akademiano (artikolo 9, “informiĝo”). Sed en artikolo 1 kun la surskribo “celo” prezentiĝas ĝia “tasko”: *konservi kaj protekti la fundamentajn principojn de la lingvo Esperanto kaj kontroli ĝian evoluon* (Aktoj III 1992: 10-11).

Por la uzantoj de Esperanto validas la Fundamento, majuskle skribita. Tio signifas: la unuopa difinita Fundamento, kun la marĝenaj plivastigoj laŭ la supre menciita normdifino. Por la Akademio validas fundamentaj principoj, minuskle skribitaj, do principoj ĝenerale, ĉi-kaze la bazaj, fundamentaj. Tiuj du elementoj estas difinitaj: “fundamento” estas “esenca elemento”, “principo” estas “origina elemento kaj fonto, fundamenta veraĵo, ĝenerala regulo” (PIV 1970: 324, 868).

“Fundamentaj principoj” do resendas al la esenco, origino, fonto, vero, ĝeneraleco de Esperanto, kaj ne al la supraĵo de la ekzistanta lingvaĵo. Dum la normo mem de la lingvo estas klara kaj konciza, por la esploraj laboroj de la Akademio do malfermiĝas iu gamo, en kiun ĝi devas meti siajn decidojn.

Pozicio en interlingvistiko

Esperanto estas planlingvo kaj tial fenomeno de la scienco interlingvistiko. Serĉante la esencon, originon, fonton de Esperanto, esploro en ĝia scienco utilas. Nur la komparo kun la ideoj en la kampo de planlingvoj montras la pozicion de Esperanto tiel, kiel ĝi estas en sia profundeco (esenco, origino, fonto).

La “projektoj de komunaj lingvoj”, do la planlingvoj, konstruiĝas laŭ “du tendencoj. Unu estas skemismo: ke vortfarado kaj derivado [...] estu plene regula, komplete sistema, tiel ke ĝi kapablas krei siajn proprajn vortformojn laŭ aŭtonomia

interna dinamiko. La alia estas naturalismo: ke la planlingvo devas severe sekvi la t.n. ‘naturajn’ lingvojn, precipe la latinan kaj latinidajn, tiel ke ĝia derivado estas interne nekohera, sed liveras formojn [...] pasive rekoneblajn de homoj lingve edukitaj.” La aŭtoro John Wells konstatas: “Principe, Esperanto staras nete en la skemisma parto de tiu gamo” (Wells 1978: 57).

Esenca por Esperanto estas ĝia karaktero de skemisma planlingvo havanta sian propran aŭtonomion. Tial ĝi devas trapensi ĉiujn siajn elementojn en sia propra sistemo: gramatiko (fiksita en la Fundamento) kaj vortoj, tiu fluanta amaso kun novaĵoj kaj eksmodiĝintaĵoj (arkaikaĵo). Necesas en Esperanto difini, kion vorto priskribu, necesas trovi kaj apliki la delikatajn diferencojn inter najbaraj vortoj (ekzemple *rekomendi, konsili, proponi, sugesti*).

Por tio aŭtonomia planlingvo devas disponi pri valida difinvortaro. Tial la statuto de la Akademio preskribas en artikolo 2, “taskoj”: *Ĝi verkas vortaron de Esperanto kun difinoj en Esperanto* (Aktoj III: 10). Ne la oficialan funkcion sed ja la praktikan rolon transprenis PIV. Kaj neeviteble necesas havi institucion, kiu povas decidi en tiuj malmultaj dubaj kazoj, kiujn la lingvouzo ne aŭ ne sufiĉe rapide solvas.

La neceso de Akademio por skemeca, aŭtonomia planlingvo fariĝas aparte klara el la kontraŭekzemplo, naturalisma planlingvo. En Interlingua oni al-kroĉas sin al la “internacia vortprovizo” trovita en la lingvoj “angla, franca, itala, portugala kaj hispana”, tiuj “romidaj lingvoj” (Gopsill 1989: 227), nomataj en la interlingvistika literaturo la “kontrollingvoj” de Interlingua (Gopsill 1989: 166, kaj Blanke 1985: 179). Do en ĉiu ajn duba kazo Interlingua-isto serĉas ekvivalenton en i.a. la itala, kaj tiam li aŭ ŝi tuj ekkonas la “ĝustan” Interlingua-vorton.

La Akademio de Esperanto estas do ne malhavebla parto de la lingva realo de tiu ĉi mondlingvo pro ĝia karaktero kiel skemeca, aŭtonomia planlingvo. Nur kiam Esperanto moviĝas for de sia pozicio en la gamo de la interlingvistikaj ebloj, do alproksimiĝas al la naturalismo, tiam la Akademio fariĝus superflua. Sed tiam la lingvo Esperanto ne plu estus si mem. Esperanto kaj ĝia Akademio estas ne distranĉeblaj. La Akademio estas esenca elemento en la lingvopolitiko de Esperanto.

Ĉeftasko kaj aktualaĵoj

La Akademio estas demandata de la esperantistoj, kiam elstaraj sed ankaŭ marĝenaj problemoj de la apliko de ĝusta Esperanto estas neklaraj. Ĝi decidis

pri la pasivaj participoj *-atal-ita* kaj ankaŭ konsilis pri *komunumolkomunaĵo*. Tiaj demandoj, ĉefe la esencaj, aperas malofte.

Tial la Akademio ne daŭre laŭtigas sian voĉon. Silentanta Akademio povas esti miskomprenata kiel senutila. Tamen tio ne ĝustas. La ekzisto de prilingva organo, kiu povus enmiksi sin, jam helpas al trankvila situacio, en kiu ĝi ne devas enmiksi sin. Gardanta institucio havas vivorajton ankaŭ se aktuale forestas bezono interveni. La okcidenta defendorganizaĵo NATO, ekzistanta sed (feliĉe!) ne aktiva, havas la pravan moton (latine): *vigilantia pretium libertatis* – por ni validu: *unitatis*.

Unu temo diskutata en la kunteksto de la lingvopolitiko ne koncernas la Esperanto-Akademion. Ĝi ne praktikas “lingvoplanadon”. Ĝi ne kreas novajn vortojn kiel la hebrea Akademio, ĉar tion faras la Esperanto-aŭtoroj kaj la uzantoj selektas. La antaŭparolo al la Fundamento de Esperanto diris eksplicite: “Iam poste, kiam la plej granda parto de la novaj vortoj estas jam tute matura, ia aŭtoritata institucio enkondukos ilin en la vortaron oficialan” (Zamenhof 1929: 46).

Tiu “ia aŭtoritata institucio” de la antaŭparolo fariĝis la Akademio (Welger 1993: 43); pri novvortoj do estas la tasko de la Akademio preni starpunkton post kiam ili estis establiĝintaj jam en la lingvouzo. La Akademio ne vidis la bezonon trakti “oficialan aldonon al la Universala Vortaro” dum jardekoj, kaj ĝi ankaŭ ne nun laboras pri tio.

Malgraŭ tiuj konsideroj restas por la Akademio kaj la akademianoj vasta laborkampo, pri la lingvo kaj pri ĝiaj vortoj. Tiel ĝi povas senĉelene partopreni en la lingvopolitiko de la Esperanto-movado.

Unueca lingvouzo

Daŭra defio por mondlingvo estas la konservado de ĝia unueco. Se tio jam estas sentebla problemo por la angla kun ĝia forta etna bazo, tio des pli minacas al planlingvo, kies bazo estas malforta kaj konsistas nur el: konscio pri la neceso ne devii de la kutimoj, aliro al la Fundamento, ekzisto de baza difinvortaro (PIV), kontrolpova Akademio.

Bazaj, ĉefe konkretaj, vortoj kiel *tablo*, *fingro*, *telefono*, ne alportas problemojn. Ankaŭ la Esperanta beletro pruvis la kapablojn de la planlingvo, tiel ke eĉ la ĝenerale skeptika publiko ne plu pridubas la potencialon de Esperanto. Sed observeblas transŝoviĝo de la centro de intereso: post sukcesoj en beletro la aktuala defio estas la faka lingvo. Multaj akademianoj, ĉefe la Akademia sekcio pri faka vortaro, jam kontribuis proponante.

Bezonate estas scii, kiu unuopa vorto antaŭrangu el pluraj terminoj. La flekseblo de Esperanto permesas al ĝiaj uzantoj rapide krei siajn terminojn. Sed tiam ni havas plurajn vortojn unu apud la alia por la sama afero. Tio estas maltaŭga en la teknika vivo, kaj pro la facileco (necesa ĉe planlingvo) ĝi estas superflua lukso.

Por la institucio en la urba trafiko, kiu ebligas uzi la veturilojn de diversaj memstaraj entreprenoj tamen per unu bileto, mi prenis la terminon “trafik-komunaĵo”; en kongresa festprelego en Hungario tiu ĉi sama institucio nomiĝis “trafika federacio”, kaj la fervojista vortaro aplikas ĝuste por tiuj ĉi kazoj la adjektivon “kombinita” (Bormann 1996: 111). Ĉiuj tri vortoj estas kompreneblaj, sed ĉar temas pri unu sola formo de institucio, decas havi unu vorton por tio.

Verkante fakan libron pri la eŭropa unuiĝo mi devis traduki amason da oficialaj nomoj de institucioj. Inter ili estis malnovaj kiel la kontrolistaro pri financoj. Tiu ĉi institucion mi nomis “Kortumo pri Kontoj” (Bormann/Frank 1994: 14), movada programo uzis la terminon “Reviziejo” (Cwik k.a.: 45) kaj *Deklingva manlibro pri politiko* proponas “Financ-Kortumo” (Maul 1994: 123); en la revuo *Koncize* (1997, paĝo 5) oni vidas “kalkulkorto”.

Same fluas titoloj por novaj organizaĵoj: ĉu nun fondiĝas “Eŭropa Ekonomia kaj Valuta Unio” (Bormann/Frank 1994: 11) aŭ laŭ tradukanta laborgrupo en Luksemburgo “Eŭropa Ekonomia kaj Mona Unio”? Kio estas “Eŭropa Konsilio” kaj kio “Konsilio de Eŭropo”? Same kiel en la ŝtataj lingvoj iu devas simple decidi pri tio.

Simile plurece uziĝas *komputilo*, *komputoro*, *komputatoro*, *komputero*, *komputro*, kun iom-post-ioma elstariĝo de *komputilo*, tamen restas la multeco de uzataj nomoj. Neklaraj estas la vortoj por komputilaj *donitaĵoj*, *datumoj*, *datenoj*. Iuj diras naturalisme *softvaro* aŭ eĉ *softvo*, dum aliaj preferas skemece *programaro*.

Ankoraŭ ne regas unuanimeco en la Esperanta lingvaĵo pri la komputilo, kaj jam populariĝas la telefono ne plu ŝnurligita sed libera. Mi ne estas kapabla preparoli tion en Esperanto, ĉar mi ne disponas pri la vortoj. Ĉu mi derivu el la germana *mantefono* aŭ, simple tradukite, *manaĵo*, ĉu el la angla *movkapablaĵo*?

Ĉe pluraj vortoj por la sama fenomeno kelkaj esperantistoj esprimas la fidon, ke lingva unueco rezultos el la lingvouzo. Sed tiu espero ne trovas ĝeneralan apogon pro la tro malgranda kvanto de fakuloj en la unuopaj fakoj. La nombro de esperantistoj ne sufiĉas por multnombra aplikado kun tendenco al unueco. Tamen, por la “ekstera lingvopolitiko” necesas planlingvo klare (unusence) esprimkapabla.

Ĉar temas pri vortoj de la ĝenerala, politika, ekonomia, aktuala vivo, la Esperanto-gazetaro malmulte ekuzas ties terminojn. Nur la revuo *Monato* kaj Pola Radio troviĝas antaŭ la neceso esprimi fenomenojn de la moderna mondo en Esperanto. Tial estas kompreneble, ke el ĝiaj laboroj estiĝis *Deklingva manlibro pri politiko* (Maul 1994).

Alrigardante la Esperanto-movadon ni devas konstati, ke lasi tiel gravan parton de la evoluo de Esperanto al la redakcioj aŭ de *Monato* aŭ en Varsovio estas nekontentige (ankaŭ se tie laboras kelkaj akademianoj). Multe pli bone estas, se la Akademio elstarus en tiuj konsilaj laboroj. Ĝuste ĝi kun sia historio havas la ŝancon atingi unuecan lingvouzon. Do ĝi donu tiun servon al la esperantistaro. Konsili estu prioritato antaŭ decidi.

Tiel enŝoviĝas en la taskokatalogon de la Akademio de Esperanto la karakterizilo “servo”. La Akademio kiel institucio servanta al la Esperanto-movado estas moderna koncepto, kiu laŭ mia konvinko devus stari apud ĝia funkcio kiel latentata decidanto pri la lingvo.

Ebenoj de intervenado

Por fari unu, du aŭ eĉ tri decidojn jare la Akademio estas establita. Sed por rapide interveni, saĝe konsili al demandoj kiam ili brulas, mankas al ĝi alkutimiĝo kaj ĝusta strukturo. Akademio daŭre partoprenanta en la lingvopolitiko de la Esperanto-movado kaj kun efikaj ebloj interveni eksteren bezonas novajn ideojn, kiujn espereble ĝia nova estraro povos enkonduki en la realon.

Ĝis nun la Akademio agis nur post decidoj de sia pleno poŝte preparitaj kaj ege longdaŭraj. Tiam temas pri elpaŝoj kun granda signifo kaj daŭra valideco. Estas kvazaŭ la papo deklaris definitivan veron *ex cathedra*. Aliaj formoj de influado fare de la Akademio sur sian publikon, la esperantistaro, ne ekzistas. Mi ne forgesas la kunvenojn dum la Universalaj Kongresoj, kiuj ja estas utilaj kaj bonvenaj por reciproka konatiĝo.

Disponi pri nur unu formo de aktivado estas ne la kutima bildo de rimedoj por influhavaj institucioj. Ŝtatoj havas en sia eksterlanda politiko plurajn eblojn de intervenado; en la defendpolitiko al etaj atakoj per unu tanko ne venu kontraŭatako per atombombo. El tiu rezonado evoluis en la tempoj de la Malvarma Milito la ideo de “respondo en variantoj” (*flexible response*).

La Akademio nun ne havas variantojn ĉe sia eksteren direktita agado. Tamen ĝi ja laboras en pluraj ebloj: en sekcioj (nur akademianoj), en komisionoj (akademianoj kun nemembroj), kaj en sia estraro. Estus utile ekde nun ebligi al

tiuj ebenaĵoj sin turni eksteren al la publiko. La sekcioj laboras, sed tio restas ne videbla por la publiko. Estas dezirinde, ke rezultoj de la sekcia laboro atingu la esperantistaron, kiu kundiskutu. Nur poste la tuto de la akiritaj scioj fariĝu objekto de traktadoj en la pleno de la Akademio kaj konduku al definitiva decido.

Antaŭe mi parolis pri nova memkompreno de la Akademio kiel ankaŭ disponiganto de lingvaj servoj. Rapide intervenkapabla servoinstitucio de la Akademio povus havi la formon de nova komisiono ellaboranta proponojn por terminoj en urĝaj kazoj. En la ĝeneralaj diskutoj pri la lingvopolitiko de Esperanto ekuziĝis por tio la vorto *fajrobrigado*. Iom pli formala nomo estus *konsilgrupo*. Ĝiaj anoj kontaktu inter si per novtipaj komunikiloj (faksilo, Interreto).

Kun konsilgrupo, aliaj komisionoj, eksteren aktivaj sekcioj kaj fine la Akademio kiel tuto ni havus sistemon de ebenaĵoj, kiu egalas al tiu de tribunaloj, kiuj ankaŭ aktivas en diversaj ŝtupoj. Unue kaj ofte decidas lokaj juĝejoj, kaj neniu riproĉas al la sistemo, se pli altaj tribunaloj poste venos al aliaj konkludoj.

Unu el niaj komisionoj traktas lingvoekzamenojn. La ekzamenaj servoj en la Esperanto-movado bezonas novan ekpuŝon. La ekzamenantoj estas la ekzekuciistoj de lingvaj decidoj kiujn lastvice faras la Akademio. La sistemo de komisionoj estas plivastigebla, kaj kie videbliĝas neceso (aŭ utilo), la Akademio ekagu.

La Akademio kiel organo de la lingvopolitiko de la Esperanto-movado jam dum jardekoj estas tre kontenta, ke ankaŭ la plej granda organizaĵo de la esperantistoj, Universala Esperanto-Asocio, nove ekprenis la temon “lingvopolitiko”, kaj ĝi volonte kunlaboras.

LITERATURO

- Aktoj de la Akademio III 1975-1991. 1992. Paris: Akademio de Esperanto.
- Albault, André. 1987. La Akademio de Esperanto: starigo kaj esenca rolo. En *Serta Gratulatoria in honorem J. Regulo Perez*. La Laguna: Universidad de La Laguna.
- Blanke, Detlev. 1985. *Internationale Plansprachen*. Berlin: Akademie-Verlag.
- Bormann, Werner. 1996. Planlingvo kiel 12-a traktatlingvo. *Grundlagenstudium aus Kybernetik und Geisteswissenschaft*, septembro 1996.
- Bormann, Werner kaj Helmar Frank. 1994. *Por plurlingveco de Eŭropo*. Berlin/Paderborn: Akademia Libroservo.
- Cwik, Michael, Hans Erasmus kaj aliaj. Sen dato. *Komunikado en la Eŭropa Komunumo: Projekto*. Bruselo/Rotterdam: Eŭropa Esperanto-Centro.
- Jarlibro 1980. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Gopsill, F. P. 1989. *International Languages: A Matter for Interlingua*. Sheffield: English Interlingua Union.
- Koncize*. Januaro-marto 1997.

- Maul, Stefan (editoro). 1994. *Deklingva manlibro pri politiko*. Antwerpen: Flandra Esperanto-Ligo.
- Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto* (PIV). 1970. Paris: Sennacieca Asocio Tutmonda.
- Schleyer, J. M. 1898. *Mittleres Wörterbuch der Universalsprache Volapük*. Konstanz: Schleyer.
- John Wells. 1978. *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Welger, Helmuth. 1993. *Kontribuoj al norma esperantologio*. Marburg: Info-Servo.
- Zamenhof, L.L. 1929. *Originala verkaro* (J. Dietterle, red.). Leipzig: Ferdinand Hirt.
- . 1962. *Lingvaj Respondoj, Konsiloj kaj Opinioj*. Marmande: Esperantaj Francaj Eldonoj.

Kreoliĝo de Esperanto inter personaj gustoj kaj oficiala normo¹

RENATO CORSETTI

1. La ĉefa teoria problemo: ĉu Detlev Blanke pravas aŭ malpravas?

La verkoj de Detlev Blanke, certe unu el la plej konataj nuntempaj studentoj de la fenomeno “planlingvo”, estas multaj, tiel ke estas embarase citi el nur unu. Tamen en ĉiuj liaj verkoj, sendepende de la eldonjaro kaj de la eldonlingvo, oni daŭre retrovas almenaŭ unu saman ideon: el ĉiuj ekzistantaj lingvoprojektoj nur unu iĝis vera lingvo. Temas, laŭ Blanke, pri la internacia lingvo Esperanto, iniciatita de L. L. Zamenhof en 1887.

Se ni, ekzemple, iras al lia kontribuo (Blanke 1989) en la libro *Interlinguistics – Aspects of the Science of Planned Languages* (Schubert 1989), ni trovas la aserton: “The only planned **language** which really has functioned, up to now, is Esperanto, initiated by L. L. Zamenhof in 1887, which has reached the 19th step of the socialization process.” (Schubert 1989: 70)². La 19-a ŝtupo, ni lernas en la sama paĝo, estas “**bilingualism** (involving an ethnic and a planned language) of children in (most often international) families”³.

Do, laŭ la citita aŭtoro – kaj cetere laŭ pluraj apogantoj de Esperanto, ĉar la asertojn de Blanke ni retrovas en preskaŭ ĉiuj informbroŝuroj pri Esperanto eldonitaj de internaciaj kaj naciaj Esperanto-organizaĵoj – Esperanto iĝis vera lingvo de vera komunumo, kiu eĉ komencis instrui ĝin denaske al siaj idoj.

El tiu vidpunkto la nuna situacio de Esperanto estus simila al tiu de piĝinaj lingvoj en la momento en kiu ili ekiĝas kreolaj.

Kvankam miaj personaj sentoj puŝas min konsenti kun ĉi tiuj asertoj (ĉar mi mem persone estas unu el tiuj homoj, kiuj uzas Esperanton normale ĉiutage, almenaŭ dum la vespermanĝo kun la tuta familio), mi opinias ke scienca objektiveco devigas min flankenmeti miajn dezirojn kaj substreki ĉiujn elementojn, kiuj laŭ mi igas Esperanton speciala kazo. Laŭ mi, fakte, la procedo de plena lingviĝo de Esperanto ankoraŭ ne estas kompleta. Alivorte Esperanto estas normala, kompleta lingvo nur por parto de siaj parolantoj – tiuj, kiuj nur uzas ĝin. Dume alia parto – tiuj, kiuj ĉefe okupiĝas pri ĝia studado kaj pri verkado en ĝi, ne pri ĝia praktika uzado – emas ankoraŭ pritrakti ĝin kiel lingvoprojekton. La relativa pezo de la du partoj supre menciitaj estas malfacile difinebla, kaj el

tio mem sekvas ke certe la parto, kiu nur uzas ĝin, por kiu ĝi estas nur lingvo kaj ne plu lingvoprojekto, ankoraŭ ne decide superpezis la alian.

Mallong-dire, Blanke nur parte pravas. Ni unue komparu, tamen, Esperanton kun la kreolaj kaj piĝinaj lingvoj.

2. Pri piĝinaj kaj kreolaj lingvoj

Ni komencu per la piĝinaj lingvoj. Unu el la lastaj manlibroj pri piĝinaj kaj kreolaj lingvoj (Arens k.a. 1995) diras ke “ili prezentas parolformojn, kiuj ne havas denaskajn parolantojn, kaj tial ili estas ĉefe uzataj kiel komunik-rimedo inter homoj, kiuj ne havas komunan lingvon” (Arens 1995: 3).

Unuavide temas pri difino, kiun ĉiu esperantisto pretus kompreni kiel difino de Esperanto. Tamen, la difino celas tiujn lingvojn, kiuj ekestis dum la jarcentoj, ĉiufoje kiam renkontiĝis homgrupoj sen komuna lingvo, kiuj iel devis interkompreniĝi kaj tiucele kreis iun komunan miks-lingvan komunikilon. La kazoj de eŭskaj fiŝkaptistoj en Gronlando, de anglaj komercistoj en Ĉinujo aŭ de afrikaj sklavoj en la amerikaj bienoj estas klaraj por ĉiuj.

Kreolaj lingvoj, aliflanke, estas piĝinaj lingvoj, kiuj akiris denaskajn parolantojn. Ĉi tiu iom simplisma difino de kreolaj lingvoj estas tute taŭga por niaj celoj. Intence ni preterlasas grandan diskuton pri difinoj kaj sennombrajn starpunktojn pri la kunlig-eblecoj inter piĝinaj kaj kreolaj lingvoj, kiujn okupiĝantoj pri ĉi tiu lingvistika branĉo faras. Kreolaj lingvoj, en ĉi tiu momento estas parolataj de proksimume cent milionoj da homoj en la tuta mondo, kaj do ili prezentas ne malgrandan lingvo-grupon.

Ni vidu nun kelkajn lingvajn trajtojn de piĝinaj kaj kreolaj lingvoj, kaj ni komparu ilin kun Esperanto.

3. Esperanto: nek piĝina (kaj eble) nek kreola

3.1. Nek piĝina

Ĉiuj libroj pri la rilatoj de lingvistoj al Esperanto mencias la favoran sintenon de Schuchardt ĉe la jarcent-ŝanĝiĝo al Esperanto kaj samtempe mencias la fakton ke li estis la ĉefa studanto de *Lingua franca*, unu el la “klasikaj” piĝinaj lingvoj. Unu el la lastaj plej influaj lingvistoj-esperantistoj, Istvan Szerdahelyi, plurajn fojojn komparis la strukturon de Esperanto kun tiu de franc-bazaj piĝinaj lingvoj.

Tamen, surbaze de la karakterizoj de piĝinaj lingvoj estas malfacile enkadrigi Esperanton en tiujn lingvojn, kaj estas malfacile kompari la sekvojn de la akirado

de Esperanto fare de denaskaj Esperanto-parolantoj kun la sekvoj de la akirado de piĝinaj lingvoj.

3.1.1. EKESTO-MANIERO

Oni kutime (vidu Arens k.a. 1995) enklasigas piĝinajn lingvojn en la klasojn: mar-ŝipa, komerca, interetno-kontakta⁴, laborista. Esperanto ne apartenas al iu ajn el tiuj klasoj. Ĝi ne ekestis *pro* praktikaj kontaktoj inter parolantoj de malsamaj lingvoj sed *por* kontaktoj inter tiaj homoj.

Do, ĝia ekesto ne okazis “nature”, sed intence, laŭplane, kio havis klarajn lingvajn sekvojn en la senco ke jam de la komenco Esperanto prezentiĝas minimume kiel “plivastiĝinta piĝina lingvo”⁵, en kiu ĉiuj necesaj gramatikaj funkcioj estas jam ĉeestaj, dum piĝinaj lingvoj, almenaŭ en la komenca fazo, prezentiĝas kiel nekompletaj komunikiloj, en kiuj la kunteksto helpas la komprenon, sed mankas la kutimaj lingvaj gramatikaj rimedoj.

3.1.2. LINGVAJ TRAJTOJ

Se, preter ilia malsameco, ni provas kunmeti la lingvajn trajtojn de piĝinaj lingvoj ni trovas rezultojn, kiuj ne kongruas kun la trajtoj de Esperanto.

Piĝinaj lingvoj havas reduktitan morfologion kompare kun la fonto-lingvoj. Ekzemple⁶ en la ĉina angl-baza piĝina lingvo:

- (1) *Boy! makee pay my that two piecee book*
 knabo fari doni mi tiujn du (klasigilo) libro
 Donu al mi tiujn du librojn, knabo!

En Esperanto morfologiaj finaĵoj estas pli abundaj ol en kelkaj el la fonto-lingvoj. Sufiĉas nur unu ekzemplo:

- (2) Mi trankvile legas belan libron

havas pli da morfologiaj finaĵoj ol la angla, la franca, la itala aŭ la germana.

Piĝinaj lingvoj havas plejparte fiksitan vortordon (kvankam ekzistas kelkaj kazoj en kiuj la ordo povas ŝanĝiĝi). Esperanto, kiel oni scias, ne havas fiksitan vortordon.

Piĝinaj lingvoj havas son-sistemon simpligitan rilate al la fontolingvoj. La Esperanta son-sistemo estas praktike ia meznombra son-sistemo de eŭropaj lingvoj (vidu Blanc 1988, en la kadro de studo pri la hebrea), sed ĝi certe ne estas ĝenerale simpla por multaj parolantoj de latinidaj lingvoj.

Piĝinaj lingvoj prenas sian leksikan materialon ĝenerale nur de unu fonto

(male al la komuna opinio). Pro tio oni parolas pri portugal-baza, franc-baza, angl-bazaj piĝinaj lingvoj. La Esperanta vort-trezoro estas multe pli miksitaj, kvankam kelkaj eĉ opinias ke ĝi ne estas sufiĉe miksitaj kompare kun sia aspirata tutmondeco.

Piĝinaj lingvoj ne havas morfemojn por indiki la tempon, la modon aŭ la aspekton de verboj. Ĝenerale oni utiligas tempajn adverbojn por la tempo. Ekzemple en la vjetnama franc-baza piĝina ligo:

- (3) *Moi bouver thé jour avant*
mi trinki teo tago antaŭe
Mi hieraŭ trinkis teon.

Esperanto havas tre ellaboritan kaj kompletan sistemon por indiki tempon, modon kaj, malpli normale, aspekton. Pensu nur pri la jena frazo:

- (4) Se mi estus ektrinkonta teon...

3.1.3. KAJ TAMEN

Aliflanke deeksteraj observantoj de la esperantlingva socio povas havi la impreson ke en multaj situacioj oni uzas piĝinecan lingvon. Ĉiu partoprenanto de naciaj kongresoj de esperantistoj povas aŭdi tre fuŝajn Esperantajn frazojn, en kiuj mankas morfologiaj indikiloj, la prononco estas tute influata de la nacia lingvo ktp. Sed, efektive, en tiuj kazoj temas pri variaĵoj de la lingvosistemo de lernantoj de Esperanto, kiuj ankoraŭ ne finlernis. Temas pri la konata fenomeno, kiu en la nacilingva literaturo estas nomata “interlingvo” aŭ “lernanto-lingvo”⁷. Temas pri nestabila sistemo, kiu normale laŭgrade evoluas al la cel-lingvo. Kaj en tiuj kazoj tiuj variaĵoj ne estas uzeblaj kaj uzataj en la kazo de Esperanto por internaciaj kontaktoj.

Kompreneble ankaŭ en Esperanto okazas kazoj de fosiliĝo (ĉeso de progresado) de la lernanto. Tiun ni kutimas nomi “la eterna komencanto”, sed ne temas pri nuresperanta fenomeno, se la nacilingva literaturo pri lingvolernado estis devigata trovi nomon por ĝi. Ĉiukaze parolantoj de tiaj variaĵoj neniam estas renkonteblaj inter esperantlingvaj gepatroj, kiuj transdonas la internacian lingvon al siaj infanoj. La hipotezo de Versteegh pri io tia (Versteegh 1993) – tio estas ke du parolantoj de malbona Esperanto geedziĝas kaj pluparolas tian variaĵon inter si kaj kun siaj infanoj – estas fascina el la vidpunkto de eksperimentantoj pri piĝinaj lingvoj, sed ĝi ne ekzistas en la praktiko laŭ mia scio.

Kompreneble en multaj kazoj ni trovas ke la gepatroj parolas variaĵon de Esperanto, kiu estas influata de iliaj gepatraj lingvoj. Sed la situacio ne estas esence

malsimila je tiu de italaj gepatroj, kiuj en la plej bona kazo parolas regionan variaĵon de la itala.

3.2. (kaj eble) nek kreola

3.2.1. KIOM DA DENASKAJ PAROLANTOJ LINGVO BEZONAS POR IĜI KREOLA?

Inter la diskutoj, kiuj okupas kreolistojn, estas tiu pri la nombro da denaskaj parolantoj de difinita piĝina lingvo por ke ĝi iĝu kreola. Kiel oni povas imagi, ekzistas pluraj ideoj; sed multaj parolas pri almenaŭ 10% da denaskaj parolantoj rilate al la entutaj parolantoj.

Dum kreolistoj diskutas pri la momento, kiam en la unuopaj situacioj tiu cifero estis atingita (ne temas pri facila esploro, ĉar plej ofte oni devas baziĝi sur taksoj de komercistoj, misiistoj kaj funkciuloj de la pasintaj jarcentoj), ni povas kompari tiun situacion kun la situacio de denaskaj parolantoj de Esperanto. En neniu momento de la longeta historio de Esperanto, oni alproksimiĝis al tiu cifero. Nuntempe eĉ akceptante la plej larĝajn taksojn de mi mem (Corsetti 1996) pri la ekzisto en la tuta mondo de mil Esperanto-parolantaj familioj, kaj konsiderante ke en ĉiu familio meznombro tri homoj parolas Esperanton (la patro kaj du infanoj), ni alvenus al du mil denaskaj parolantoj. Se aliflanke pri la nombro de esperantistoj ni prenas la plej mallarĝajn taksojn, kiujn mi iam renkontis, 50 000 en la tuta mondo (Large 1985), tiam la procentaĵo de denaskaj parolantoj estus tamen nur 4%, ankoraŭ malproksima de la postulata 10%.

Aliflanke oni povas prudente opinii ke la efektiva procentaĵo estas multe malpli granda. Al tio aldoniĝas la fakto ke tiuj denaskaj parolantoj apenaŭ havas kontakton inter si. La ĉiujaraj infanaj kongresetoj aŭ Renkontiĝoj de Esperantlingvaj Familioj nur kolektas kelkajn dekojn da infanoj por unu semajno. Esperanto, do, el ĉi tiu vidpunkto ne estas en la kondiĉo esti rigardebla kiel kreola lingvo fare de kreolistoj.

3.2.2. LINGVAJ TRAJTOJ

Kontraste al piĝinaj lingvoj, kreolaj lingvoj evoluigis rimedojn por gramatike esprimi ĉiujn necesajn ideojn. Efektive oni trovas plurajn lingvajn trajtojn, kiuj estas similaj inter Esperanto kaj kreolaj lingvoj.

Aparte interesa estas la sistemo de afiksoj por marki la tempon, modon kaj aspekton. Komparu la jenajn frazojn el la kreola saramaka lingvo (Saramaccan):

- (5) *mi lobi di fisi*
Mi ŝatas fiŝon

- (6) *mi bi-lobi di fisi*
Mi ŝatis fiŝon
- (7) *mi o-lobi di fisi*
Mi ŝatos/us fiŝon
- (8) *mi ta-lobi di fisi*
Mi ŝatadas/is fiŝon
- (9) *mi bi-o-lobi di fisi*
Mi estus ŝatinta fiŝon
- (10) *mi bi-o-ta-lobi di fisi*
Mi estus ŝatadinta fiŝon
- (11) *mi o-ta-lobi di fisi*
Mi estos ŝatadanta fiŝon

Esperanto sekvas sistemon malsaman, sed la malsameco estas pli forma ol substanca.

Aliflanke, kreolaj lingvoj, almenaŭ tiuj bazitaj sur eŭropaj lingvoj, emas ne havi morfemojn, kiuj utilas por difini la kategorion de la vorto. Ekzemple, en la kreola lingvo Sranan:

- (12) *a liba bradi*
la rivero larĝas
- (13) *a liba de so bradi*
la rivero estas tiel larĝa
- (14) *a bradi liba*
la larĝa rivero

Kiel oni scias, Esperanto havas precize malan sistemon.

Kreolaj lingvoj emas utiligi tonojn, kiel en kelkaj afrikaj lingvoj, kaj ne nur akcentojn. Esperanto certe ne estas ton-lingvo.

Kaj kreolaj lingvoj kaj Esperanto forigas la sistemon de neakcentitaj pronomoj kunligitaj kun la verboj, kiuj estas komunaj en eŭropaj lingvoj, kaj preferas uzi tre klarajn formojn, ekzemple:

- (15) Mi donas tion al vi
aŭ
- (16) Mi vidas ŝin.

3.2.3. EKSTERLINGVAJ TRAJTOJ

Kreolaj lingvoj havas malsaman staton en malsamaj landoj. En kelkaj lokoj ili akiris iugradan rekonon kaj estas eĉ instruataj en lernejoj (vidu la debaton pri la uzo de la papiamenta lingvo en la lernejoj de Kurasao); en aliaj lokoj ili nur funkcias kiel parolaj lingvoj, dum la oficialaj funkcioj apartenas al eŭropa lingvo. En la klasika diglosia situacio ĝenerala en kreollingvaj landoj, la kreolaj lingvoj havas la malaltajn funkciojn (Ferguson 1959). Ekzistas kompreneble esceptoj, ĉefe en la kazo de lingvoj uzataj por religiaj ritoj.

Esperanto ankaŭ havas malsaman staton en malsamaj landoj, sed en neniu lando ĝi estas enkadrigbla en diglosian skalon. Ĝia uzo estas tiom limigita, ke oni ne povas paroli pri ĝia uzo en la socio. Aliflanke por la individuoj, kiuj uzas ĝin, ĝi kutime havas nur altajn funkciojn. Dum oni aĉetas kolbasojn kaj panon kaj aŭtobusajn biletojn per la loka lingvo, oni uzas Esperanton ĉefe por legi gazetojn kaj librojn, por korespondi kun eksterlandanoj, ktp.

Kreolaj lingvoj posedas vastan popolan literaturon. Ekzemple Helman (1977) listigas ok literaturajn genrojn en Surinamo. Ili estas: mitoj, legendoj kaj sagaoj, proverbaj rakontoj, rakontoj, divenaĵoj, filozofiaj proverboj, religiaj kaj magiaj formuloj, kaj popolaj kantoj (baladoj, am-kantoj, lul-kantoj, labor-kantoj kaj danc-kantoj).

Moderna proza skribita literaturo ludas malpli grandan rolon. Kreolaj verkistoj estas daŭre disŝiritaj inter la deziro verki en la kreola kaj la pli grandaj eblecoj trovi legantojn en eŭropaj lingvoj. Cetere, nur tiuj, kiuj verkis en eŭropaj lingvoj gajnis Nobel-premiojn pri literaturo.

En Esperanto la situacio estas preskaŭ precize la mala. Ekzistas la sonetoj de Ŝekspiro kaj la Kalevala aŭ la Dia Komedio. Mankas popola literaturo, kiel ĉiu gepatro de denaske Esperanto-parolanta bebo scias.

4.1. *Trajtoj de la kreoliĝo de Esperanto*

Se la situacio de Esperanto, en la momento kiam ĝi akiras ĉiutagan uzon (ne nur de denaskaj parolantoj sed ankaŭ de eventualaj lernintoj) ne similas tiun de piĝinaj aŭ kreolaj lingvoj, ĝi tamen havas aliajn paralelojn en la mondo.

La nederlanda lingvisto Versteegh (1993) tute prave indikas la ek-re-uzon de la hebrea kiel unu el la plej proksimaj paraleloj. En ĉi tiu kazo lingve konsciaj gepatroj klopodis paroli kun siaj infanoj lingvon kun granda literatura tradicio sed ne plu uzatan por la praktika vivo dum jarmiloj. Estas klare ke en ĉi tiu kazo temas pri ekzemplo de “artefarita dulingveco” (Kielhofer kaj Jonekeit), kiu plene sukcesis.

La sukceso havis ankaŭ lingvajn sekvojn, al kiuj ni povas nur aludi ĉi tie. Por komenci la son-sistemo de la lingvo eŭropiĝis (vidu ĉi-rilate Blanc 1968). Poste pluraj gramatikaj neregulaĵoj falis, dum la lingvo akiris ankaŭ kelkajn neformalajn variaĵojn. Novaj parolantoj de la lingvo kreis novajn vortojn por novaj konceptoj kaj utiligis internaciaĵojn (ekz. *radio*, *televido*, *telegrafo*), arabajn onomatopeojn, jidajn slangaĵojn. La rezulto de ĉio ĉi estas la nova hebrea (kp. Horowitz 1988).

Aliflanke, tiu ne estas la nura ekzemplo. En ĉiuj kazoj, kie oni klopodas uzi lingvon, kiu ĝis tiam havis nur “altajn” funkciojn, por ĉiutaga uzo oni troviĝas antaŭ la samaj problemoj. Versteegh mem estas fakulo pri la problemoj, kiujn kuntrenas la moderna uzo de la norma ĝenerala araba, kiu ne estas gepatra lingvo en iu el la arabaj landoj.

La problemoj krei taŭgan televidan materialon uzeblan en ĉiuj arabaj landoj (bone konata estas la ekzemplo de la adapto al la araba de la usona televida programo *Sesame Street*), estas konata al homoj, kiuj interesiĝas pri instruado de gepatraj lingvoj. Fakte en ĉiuj arabaj landoj la “moderna norma araba”, kiun oni celas instrui kaj paroli, ne estas ies gepatra lingvo (vidu kiel enkondukon al la problemo Maamouri 1990).

Similan vojon iris la itala dum ĉi tiu jarcento, kiam ĝi ĉesis esti nur skriba komunik-kodo por la superaj klasoj kaj iĝis lingvo denaske lernata (en tre komplika situacio de multdialekteco) de granda parto de italoj (vidu De Mauro 1963 kaj postajn eldonojn). Por ricevi nur preterpasan impreson pri la vasteco de ĉi tiu fenomeno en Italujo, sufiĉas konsideri ke en la komenco de la jarcento la norma itala estis parolata (en iu ajn formo) de malpli ol unu kvarono de la loĝantaro, dum nuntempe trikvaronoj de la infanoj akiras ĝin denaske (kvankam plejmulte en unu el la regionaj variaĵoj kaj tre ofte kune kun aliaj dialektoj).

En la kazo de la araba kaj de la itala, evidente la vastiĝo de la uzo al la ĉiutaga vivo kuntrenis la ekuzon de la grandaj leksikaj provizoj por ĉiutagaĵoj, kiujn prezentas la dialektoj. Samtempe la plej malfacilaj gramatikaj strukturoj emas malaperi (ekzemple la malregulaj formoj de la verboj en la estinteco en la itala). Kaj ankaŭ fonologie en la kazo de la itala la sistemo de sep vokaloj emas reduktiĝis al sistemo de kvin vokaloj. Alivorte la ĉirkaŭaj lingvoj (“adstrataj” nomas ilin kreolistoj) emas doni tion, pri kio oni bezonas kaj emas aserti siajn ĉeeston, influante la evoluon de la kreoliĝanta lingvo.

Versteegh tamen pravas pri tio ke en ĉi tiuj aliaj kazoj (krom en la hebrea) la procedo ne iris samtempe kun granda lingva konscio de la parolantoj. Italaj gepatroj ne estas aparte interesataj pri lingvoj aŭ pri la gramatika pureco de la norma itala, sed esperantistoj estas.

Cetere nur por mencii kuriozaĵojn, mi diru ke tiuj homoj, kiuj klopodas verki en la latina pri ĉiutagaj, modernaj aferoj, havas precize la saman problemon de la unuaj re-parolantoj de la hebrea kaj de la parolantoj de Esperanto. Dum oni sukcesas senĝene verki en la latina tre klerajn disertaciojn pri la poezia arto de Ovidio, oni povas nur malfacile verki menu-liston por restoracio.

Mi donu nur kelkajn ekzemplojn pri la problemoj, kiujn latinistoj heroe provas solvi (Pavanetto 1991):

<i>Chartula venaria ad viam</i>	=	vojaĝbileto
<i>Diurnarius</i>	=	ĵurnalisto
<i>Doctor machinarius</i>	=	inĝeniero
<i>Thermopolium</i>	=	trinkejo
<i>Fistula nicotiana</i>	=	cigaredo
<i>Tromocrata</i>	=	teroristo
<i>Pyrobolus</i>	=	bombo

Unu tuta areo de problemoj rilatas al lerneja uzo de lingvoj. Ni ne tuŝas ĝin ĉi tie ĉar en neniuj loko en la mondo Esperanto estas uzata kiel ĉefa lerneja lingvo (lingvo, kiun parolas instruistoj por instrui malsamajn fakojn), krom en kelkaj eksperimentaj situacioj, kiel la unusemajna “Gimnazio” organizata ĉiujare de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. La problemoj, kiujn oni devas alfronti por igi parolatajn lingvojn instrulingvoj, estis plurfoje alfrontitaj de Unesko ekde la kvindekaj jaroj (Unesko 1953). Similajn problemojn certe renkontus Esperanto, en kiu, ekzemple, ankoraŭ ne stabiligis la vorto, kiun oni devas uzi por paroli pri la noto, per kiu instruistoj difinas la rezultojn de la taskoj aŭ ekzamenoj de la lernantoj. Mi aŭdis almenaŭ tri vortojn por ĉi tiu signifo: *poento*, *marko* kaj *noto*.

4.2. Esperanto kaj ĉiutagaĵoj

Kiam temas pri la evoluo de la speco de Esperanto, kiu estas uzata en la praktiko, ni povas fiksi nian atenton je du aspektoj: la vortaro kaj la lingvo-reguloj. Pri alia aspekto ankaŭ tre grava, la fonologio, ni donos nur mallongajn indikojn pro manko de studoj ĉi-rilate.

4.2.1. LA VORTARO

La ekuzo de Esperanto en la praktiko starigas konsiderindajn vortarajn problemojn por esperantlingvaj gepatroj. Oni devas lerni la ekzistantan vortostokon rilatantan al ĉiutagaj aferoj kaj aĵoj, kaj oni devas adapti ĝin al sia ĉirkaŭaĵo. Kvankam la lernado de la ekzistanta vortostoko ŝajnas banala problemo, ĝi ne estas tia.

La grandaj vortaroj, inkluzive de Plena Ilustrita Vortaro, ofte simple preterentantas tiun flankon de la vivo, aŭ en kelkaj kazoj prezentas proponojn de la verkinto, kiuj neniam estis provitaj en la praktiko. Dum ĉiu esperantisto lernas en la kurso paroli pri internaciaj aferoj, pri vojaĝoj al kongresoj, pri korespondado kun malproksimaj esperantistoj, oni ĝenerale ne lernas kiel nomiĝas tiuj apartaj iloj, kiujn oni uzas por kuiri aŭ por purigi telerojn. Unu el miaj unuaj problemoj, kiam mi ekuzis Esperanton hejme, estis la nomo de la lignaj pinĉiloj, kiujn oni uzas por fiksi lavitajn vestojn je ŝnuro dum ili sekigiĝas, kaj tiam mi estis jam verkinta librojn en Esperanto kaj ĉeestinta amason da internaciaj kongresoj.

Alia malfacilaĵo fontas el tio ke esperantlingvaj familioj vivas dise tra la mondo en situacioj en kiuj la materia kulturo ĉirkaŭ ili estas ege malsimila. Do vortoj kiel *kaf-kruĉo* en la realo povas esti tre ĝeneralaj kaj signifi tute malsamajn aĵojn. Tio estas, ekzemple, tre klara, kiam temas pri manĝaĵoj. Esperantlingva familio en Italujo ne povas vivi, se ĝi ne solvas la problemon rilatantan al *mortadella* (speco de granda kolbaso farita el porka kaj alispeca viando), dum por esperantlingva familio vivanta en Hungarujo, tiu problemo ne ekzistas, dum prezentiĝas la problemo de *langoŝoj* (frititaj ringformaj pan-flanoj).

Aliflanke ankaŭ kiam temas pri samaj (aŭ sufiĉe similaj) aĵoj, ekzemple vindotukoj por beboj, la diseco de la unuopaj familioj igas ĉiun familion solvi en izoleco la saman problemon en malsama maniero. Interkrampe la diseco ekzistas ankaŭ inter la tempoj, ĉar la solvoj de la familioj, kiuj uzis Esperanton en aliaj generacioj, perdiĝis pro manko de registrado en alirebla formo.

Antaŭ kelkaj jaroj estis lanĉita por la familioj, kiuj estis kunligitaj de cirkulaĵo por esperantlingvaj paroj kaj familioj, la provo redakti iun “hejman vortaron”, kiu neniam transiris la komencon stadion, kvankam ĝi cirkulis inter la koncernaj familioj. Nun la provo estas daŭrigata en la kadro de la elektronra diskut-forumo por familioj, kiuj edukas denaskajn parolantojn de Esperanto⁸.

La elektronaj rimedoj permesas viglan interŝanĝon de ideoj inter la kundiskutantoj, kiuj loĝas ĉefe, sed ne nur, en Norda Ameriko kaj Norda Eŭropo. Por doni ideon pri la vortaraj problemoj, kiuj interesas ĉiutagajn parolantojn de Esperanto, mi listigas ĉi tie la temojn pri kiuj oni diskutis en la forumo dum dudek tagoj de la pasinta februaro, precize de la 7-a ĝis la 26-a de februaro 1996 (mi elektis nur la privortajn temojn):

- ĉu *necesujo* aŭ *necesabo*?
- la nomoj de la rolantoj en la bildrakontoj de Disney
- la nomoj de la fingroj en Esperanto (zamenhofa uzo kaj modernaj variantoj)
- la vorto por priskribi infanon, kiu lernis sendepende uzi la necesojn (puruma)

- ĉu *vindaĵo* aŭ *vindotuko*?
- kion signifas la vortoj *vindi* kaj *revindi*?
- laktopulvoro
- kiel vi nomas en Esperanto la trinkaĵon *Coca-Cola*?
- meritoj kaj malmeritoj de la vortoj *gren-kaĉo*, *kaĉo-sup*o, *gren-sup*o.

Estas evidente ke, almenaŭ por la partoprenantaj familioj, tio estas rimedo akiri unuecan lingvouzon en la longa daŭro. Mi diras “en la longa daŭro”, ĉar vi povas kompreni ke en la mallonga daŭro multaj defendas siajn opiniojn kaj elektojn per ĉiuj siaj fortoj.

Kiam tiu vortolisto estos en iu formo je dispono de ĉiuj interesiĝantaj familioj, verŝajne unu plia paŝo estos farita sur la vojo, kiu portas Esperanton iĝi normala lingvo.

Mi volas ankaŭ aldoni, ke ĉi tiu speco de laŭplana, komuna kreado de novaj terminoj aŭ komuna difinado de la signifo-kampo de malnovaj terminoj (kio, ekzemple, estas “taso”?) estas io, kion oni ne renkontas en normalaj kreoliĝaj procedoj, en kiuj la vortoj estas kreataj aŭ spontane de la parolantoj, ĉerpante el la cetera lingva materialo je dispono, aŭ de lingvaj instancoj. Iusence en Esperanto la afero antaŭeniras pli demokrate kaj danke al la granda interesiĝo de la familioj pri tiu kampo.

Fine, mi devas diri ke malofte inter la ĉiutagaj parolantoj (kaj tion mi diras surbaze de almenaŭ unujara observado de la diskutoj) plimultas homoj, kiuj estas ege pli prudentaj en sia lingva uzo ol multaj aliaj neĉiutagaj parolantoj. Alivorte se de tempo al tempo oni trovas homojn, kiuj “per siaj gamboj descendas eskalojn”, tre pli ofte oni trovas nur homojn, kiuj “ŝtuparas malsupren per siaj kruroj”.

Oni havas la impreson ke transdonante la lingvon al siaj idoj ili sentas iuspecan respondecon eviti nestabilajn formojn. Tiurilate ili kondukas simile al la unuaj parolantoj de la hebrea, pri kiuj parolas Versteegh (1993). Eĉ unu el la diskutoj de la lasta jaro estis pri la “purismo” de Esperanto-parolantoj, kiuj ĉiurimede klopodas eviti ankaŭ vortojn, kiuj iĝis internaciaj, kaj preferas uzi tut-Esperantajn radikojn. Ekzemple, oni trovas manierojn diri *hamburger* (= hamburgaĵo), *popcorn* (= pufmaizo) ktp el pure Esperantaj elementoj, kio ŝajnas ekstrema purismo en lingvo, kiu ĝuste celas esti internacia. Aliflanke la kontraŭstaro psiĥologia al la usona kulturo, el kiuj tiuj esprimoj fontas, kaj al la maniero laŭ kiu ĝi konkeras la mondon, ludas laŭ mi grandan rolon pri tio. La observoj de Labov (1972) pri la rolo de individuoj kaj ties ideoj rilate al lingvo-ŝanĝiĝo restas daŭre validaj.

Unu lasta observo povas rilati al la kampo de manĝaĵoj, pri kiuj la evoluo ŝajnas relative simila al tiu, kiu okazas en aliaj lingvoj, ekzemple la angla, parolata

eksterlande. Oni asimilas nur la ĉefajn manĝaĵojn kaj uzas por ili Esperantajn terminojn, dum multaj specife lokaj aĵoj estas pluuzataj en neasimilita formo. Precize la samon faras, ekzemple, la anglalingva komunumo stabile loĝanta en Italujo.

4.2.2. LA LINGVAJ REGULOJ

Aliflanke, oni apenaŭ trovas diskutojn, kiuj tuŝas la gramatikon de la lingvo. Dum la pasinta jaro mi povas memori nur pri unu pri relative flanka punkto: Ĉu oni diru “Mi trinkas lakton varma” aŭ “Mi trinkas lakton varman”? Tio konfirmas la ĝenerala tendencon observeblan inter la parolantoj de Esperanto al lingva konservemo. Tia konservemo estas parto de la idearo, kaj helpis Esperanton travivi kaj relative sukcesi iĝi vera lingvo de vera komunumo. Alivorte, ĉiam efikas la devizo “Dum aliaj babilas senfine pri la preferinda formo de la internacia lingvo, ni ne okupiĝu pri tio sed apliku Esperanton.”

Tion priskribas ankaŭ A. Sakaguchi (1995: 17) “La konvinko de la plej granda parto de la parolantoj pri la aparta rolo de planlingvo kiel unuca, interetna (monda, help-lingvo) havas je ĝi stabiligan kaj konservan efikon.”⁹ Kaj cetere la sama aŭtorino en alia verko (Sakaguchi 1996), kie ŝi klopodas listigi ĉiujn diakronajn ŝanĝojn en Esperanto, sukcesas prezenti nur ŝanĝiĝojn en la vortaro kaj en la signifokampo de kelkaj vortoj, sed ne vere bazajn gramatikajn ŝanĝiĝojn dum la lastaj cent jaroj.

Kompreneble ni ne troviĝas en situacio en kiu ekestis vera komunumo, stabile loĝanta ie kaj daŭre interkomunikiĝanta per Esperanto kaj regule influata de nur unu lingva substrato, superstrato aŭ adstrato.

4.2.3. LA PRONONCO DE ESPERANTO

Ĉiuj konantoj de la esperantlingva komunumo povas diri al interesiĝantoj ke la prononco de Esperanto pliboniĝas, pliunueciĝas de unu generacio al alia. Tio ŝajnas esti sekvo de la novaj teĥnikaj rimedoj de komunikado, kiuj permesas al ĉiu ajn relative facile aŭskulti eksterlandajn prononcojn kaj kompreneble samtempe vastiĝis la eblecoj vojaĝi kaj renkonti eksterlandanojn kaj paroli kun ili.

Ankaŭ en ĉi tiu kampo, tamen, ne okazis “revolucioj”.

La ofte priparolata malapero de la *ĥ*-sono favore al *k* estas almenaŭ dubinda, ĉar *ĥ* trovas ĉiam novajn apogantojn.

Samtempe forte evoluis en ĉi tiu kampo la konscio pri normoj ĉe la Esperanto-parolantoj (Lloancy 1995). Eĉ temas pri kazo en kiu la normo fiksiĝis malgraŭ la konsiloj de influhavaj esperantologoj.

Male oni ankoraŭ ŝajnas havi malaltan konscion pri la fenomenoj de intonacio, en kiu esence ĉiu sekvas sian nacian modelon. La nura lingvisto, kiu miasce interesiĝis pri intonacio en Esperanto (Blazio Wacha), ankoraŭ ne produktis libroforme la rezultojn de siaj observoj.

Ĉi tie ni diru mallonge ankaŭ pri la fenomeno de onomatopeoj kaj fi-vortoj. Miaj propraj observoj de la situacio (Corsetti 1986), supozigas ke la procedo de “kreoliĝo” estas ankoraŭ en la komenca fazo. Esence ĉiu ĉerpas abunde el sia nacia lingvo, kaj unuecaj onomatopeoj kaj fi-vortoj estas ankoraŭ neatingitaj.

5. Pri la influo de denaskaj parolantoj al la evoluo de Esperanto

En ĉiuj manlibroj pri lingvistiko almenaŭ de ĉi tiu jarcento oni trovas la indikon ke lingvo estas tio, kion difinitaj denaskaj parolantoj de ĝi normale uzas inter si por komuniki. La graveco de denaskaj parolantoj estis eĉ pli emfazita ek de la sesdekaj jaroj en la kadro de la skolo, kiu sekvis la ĉomskiajn ideojn. Laŭ tiu skolo estas la denaska kompetenteco, kiu difinas tion, kio estas aŭ ne estas gramatike ĝusta¹⁰. Kvankam mi havas fortajn dubojn pri multaj el la asertoj de tiu skolo, indas rigardi kiel statas la situacio en la Esperanta komunumo.

Nu, oni ne sukcesas trovi ie ajn rimarkojn pri la influo de denaskaj parolantoj je la normale uzata Esperanto. Verŝajne la malmulteco de denaskaj parolantoj kaj ilia diseco tra la mondo estas ĉefe influaj ĉi-rilate. Krome, eble, la fakto ke nur malmultaj el ili aktive partoprenas la vivon de la esperantlingva komunumo (kvankam kelkaj ja faras tion).

Sed, se oni esploras la dokumentojn pri la plej arda lingvaj disputoj dum la lastaj jardekoj (*-ata/-ita*, ekzemple), nenie oni trovas indikojn pri tio ke oni konsideris la vidpunktojn de homoj, kiuj havas denaskan kompetenton pri la lingvo, kaj do povas plej trafe juĝi pri la gramatikeco/malgramatikeco de difinitaj frazoj. Tio estas ankoraŭ pli surpriza se oni konsideras ke la *-ata/-ita* disputo okazis dum la plej glora momento de la ĉomskiaj teorioj.

Same okazas se oni rigardas la plej grandajn verkistojn kaj poetojn de la historio de Esperanto, tiuj, kiuj jes havis influon almenaŭ en la vortara kampo. Ĉe neniu oni trovas la indikon: “li/ŝi lernis Esperanton denaske”. Tio estas, laŭ mi, bedaŭrinda, ĉar, kvankam oni rajtas ne akcepti la ideojn de Chomsky en lia preskaŭ mistika kultado de la pura denask-parolanto, ĉiutagaj parolantoj de Esperanto (same denaskaj kiel nedenskaj) ŝajnas ĝenerale evoluigi pli grandan lingvan senton ol la ceteraj esperantistoj kaj ŝajnas ekposedi la kapablon ekspluati la latentajn eblecojn de la lingvo multe pli bone.

6. Personaj gustoj en la evoluo de Esperanto

La homoj, kiuj miatakse influas la evoluon de Esperanto en la nuna momento, pli ol la denaskuloj estas verkistoj kaj redaktantoj de revuoj. Aliaj homoj, kiuj klopodas influŝanĝojn estas esperantologoj kaj oficantoj en la lingva instancoj de la esperantlingva komunumo. Kiam temas pri la unuaj, oni devas konstati ke, almenaŭ en la lastaj jardekoj, inter la verkistoj kaj redaktantoj tro multe superpezas homoj, kiuj ŝatas ian okcident-eŭropan variaĵon de la lingvo, sed ĉiukaze por tiaj homoj Esperanto ankoraŭ ne estas kompleta lingvo. Ĝi estas lingvo en kiu oni rajtas laŭplace interveni por ŝanĝi eĉ la plej bazajn leksikajn elementojn. Se Esperanto estus jam normala lingvo, laŭ la asertoj de Blanke, kiujn mi menciis en la komenco de ĉi tiu artikolo, tia agado ne estus ebla.

Mi ne volas menci iun apartan revuon aŭ libron, sed interesiĝantaj legantoj povas mem facile trovi ekzemplojn. Mi nur volas substreki ke mi neniam trovas en libroj verkitaj en “normalaj” naciaj lingvoj la paĝojn de “glosaro” aŭ “lingvaj notoj”, kiuj estas normala aldonaĵo al iu ajn romano aŭ poem-kolekto en Esperanto.

Se difinita unuopa verkisto en la angla aŭ en la itala provus ŝanĝi tiel bazajn vortojn kiel *malbona* aŭ *kuracilo*, li iĝus kazo por la lokaj kuracistoj. En Esperanto tio, tamen, eblas.

Kvankam ni scias ke trovado de ekvilibro inter la skemisma kaj naturisma tendencoj en Esperanto ne estas tre facila (vidu ĉi-rilate Piron 1989), mi kredas ke por tiuj aŭtoroj eĉ ne ekzistas la problemo trovi ekvilibron. Por ili Esperanto ankoraŭ estas inventebla lingvo.

En neniu de mi konata nacia situacio oni provas inventi novan sistemon por la pasivaj partipoj. En Esperanto tio eblas¹¹.

Bonŝance la komuna prudento de la normalaj parolantoj rezistas tiajn provojn, sed ree ni povas diri ke, ekzemple, la germana publiko ne estas devigata daŭre lukti kontraŭ la germanaj verkistoj, kiuj provas ŝanĝi fundamentajn elementojn de la lingvo. Tio estas alia elemento kontraŭ la aserto de la atingita lingva normaleco de Esperanto.

Se ni venas al la dua grupo aludita en la komenco de ĉi tiu sekcio, tio estas la anoj de niaj lingvaj instancoj, la situacio estas ankoraŭ pli katastrofa. Daŭre dum la lastaj jardekoj oni povis spekti la giganto-lukton inter la “simplaj” parolantoj de Esperanto kaj la gvidantoj de la Akademio de Esperanto, kiu laŭdifine devus gardi la lingvon kaj gvidi ties evoluon.

Laŭ mistero klarigebla nur fare de psiĥopatologiistoj, la “simplaj” parolantoj devis defendi sian lingvon kontraŭ la homoj, kies tasko estis la defendo de la lingvo.

Mi ne malkaŝas sekreton, se mi diras ke la Akademio de Esperanto per siaj provoj atingis en la nuna momento la malpinton de sia prestiĝo. Espereble, tuŝinte la fundon, nun ĝi ree ekalsupros.

Mi intence ne volas mencii nomojn, kiuj tamen estas bone konataj al ĉiuj. Permesu al mi doni nur unu ekzemplan ekzemplon (oni povas trovi centojn).

En brita revueto aperis artikolo (Grimley-Evans 1996) en kiu oni raportas pri esploro farita tra la interretaj tekstoj por vidi kiun terminon la uzantoj de komputiloj uzas por la maŝino mem. La esploro montris ke unuece la esperantlingvaj komputilistoj uzas la vorton *komputilo*. La artikolanto konkludas ke “la lingvokomunumo jam preskaŭ atingis unuecon pri ĉi tiu termino, kaj tion ĝi atingis ŝajne sen la helpo de la Akademio. Oni povus eĉ diri, ke malgraŭ la Akademio, ĉar la ĉefaj subtenantoj de *komputero* kaj *komputoro* estas ĝuste la direktoroj de la sekcioj pri Ĝenerala kaj Teknika Vortaro, respektive. Faru proprajn konkludojn pri la utilo de nia plej alta lingva institucio!”

Estas evidente, ke la Akademio de Esperanto en la pasintaj jardekoj plene perfidis la taskojn, kiujn la komunumo volas ke ĝi plenumu.

Anstataŭ gvidi la evoluon de la lingvo, helpi ĝin per plenigo de la ekzistantaj fakaj vakuoj, konsili eldonantojn pri konservado de la fundamenta Esperanto, ĝi okupiĝis pri luktado kontraŭ la solvoj intuicie alprenitaj de la parolantoj de Esperanto.

Evidente ankaŭ por la akdemianoj Blanke malpravas kaj Esperanto estas ankoraŭ lingvo planebla¹².

Ĉar, tamen, mi opinias ke Esperanto estas lingvo jam planita, kiu nur bezonas kompletigon en kelkaj kampoj (ĉiutaga vivo kaj fakaj kampoj), mi esperas ke la komunumo sukcesos konvinki la Akademion akcepti la malkovrojn de lingvistiko por kompreni la veran funkci-manieron de Esperanto (ĝi, por uzi tro uzitan frazon, ne simple estas la franca kun *o*-finaĵoj) kaj labori, interkonsente kun la parolantoj, por la evoluo de Esperanto en la respekto al ties baza spirito¹³.

7. Ĉu konkludo estas ebla kaj bela?

Jes, laŭ mi konkludo estas ebla.

Blanke pravas, kiam li diras ke el ĉiuj lingvaj projektoj nur Esperanto sukcesis trairi la 19 ŝtupojn por iĝi lingvo.

Tamen, ni konsciu (ankaŭ se ni kaj Blanke ne tiom malkaŝe emfazas tion, kiam ni parolas al la ekstera publiko), ke ni estas ankoraŭ malproksimaj de la situacio de “normalaj” lingvoj. Nia socio estas ankoraŭ tro malgranda kaj tro disa por ke

ĝi povu efike kontraŭpezi eventualajn unuopulajn strangaĵojn, kiuj celas stiri la lingvon al persone preferataj direktoj.

La ĉefa reprezentanto de la komunumo, tio estas Universala Esperanto-Asocio, ne aparte interesiĝis lastatempe pri kohera lingvopolitiko, kaj lasis la ŝipon iri tien aŭ reen laŭ la momenta emo de la remistoj, kiuj samtempe remis al pluraj direktoj.

La interinfluo inter lingvo-scienlistoj kaj la movado estis apenaŭa.

Tamen, la parolanta socio ekzistas (kaj ĝi montris ke ĝi kapablas rezisti iugrade la nov-bakitajn zamenhofojn). Nia tasko en la venontaj jardekoj estas igi ĝin ĉiam pli forta kaj kapabla antaŭenporti sian lingvon al novaj kampoj laŭ sia komuna prudento surbaze de racie (kun-)laborantaj homgrupoj, kiuj devus kapabli gardi la normojn dum la lingvo disfloras.

NOTOJ

1. Malsama versio de ĉi tiu artikolo, en kiu la emfazo estas sur la denaska akirado de Esperanto kaj ĝiaj teoriaj problemoj, estis prezentita okaze de la Simpozio pri Multkulturaj Familioj en Bratislavo, 1 aŭgusto 1996.

2. La nura planita **lingvo**, kiu efektive funkciis, ĝis nun, estas Esperanto, iniciatita de L.L. Zamenhof en 1887, kiu atingis la 19-an ŝtupon en la ensociiga procedo. (Nia traduko. La dikigo de la vorto lingvo estas en la originalo.)

3. **Dulingveco** (inkluzivanta etnan kaj planitan lingvon) de infanoj en (plej ofte internaciaj) familioj. (Nia traduko.)

4. Ĉi tiu klaso, kiu unuavide ŝajnus taŭga por Esperanto, efektive rilatas al kontaktoj inter triboj por komercaj aŭ religiaj celoj.

5. *Extended pidgin* en la anglalingva literaturo.

6. La ekzemploj, kiuj sekvas estas prenitaj el pluraj fontoj, sed ĉefe el Arends 1995.

7. *Interlanguage* aŭ *learner language* en la angla. Komparu la verkon de Klein (1986).

8. La diskutforumo estas alirebla je la ret-adreso de la iniciatinto (jouko.lindstedt@helsinki.fi), la konata lingvisto Jouko Lindstedt el Helsinko. Li estas ankaŭ la mastrumanto de la forumo kaj krome li prizorgas la registradon de la novaj terminoj en *Hejma vortaro* (eldonita libroforme de UEA en 1999).

9. Traduko de la aŭtoro. La substreko aperas en la originalo.

10. La verkoj de Chomsky kaj de la tuta ĉomskia skolo estas miloj. Ĉi tie mi citu nur tiun, kiu estas ĝenerale rigardata kiel la unua. Temas pri Chomsky 1957.

11. Mi ne volas citi iun apartan kazon. Interesiĝantoj pri novaj partcipaj sistemoj, tamen, rajtas foliumi la lastajn jarkolektojn de la itala revuo *l'esperanto*.

12. Ne estas eble ne menciĝi ĉi tie la rolon de la Plena Ilustrita Vortaro, verko de iama prezidento de la Akademio kaj la plej disvastiĝinta vortaro de Esperanto dum la lastaj jardekoj. La malboneco de tiu vortaro kaj ĝia misefiko al la evoluo de Esperanto, povos esti taksata nur de venontaj generacioj de vortaristoj. Dum en aliaj lokoj mi, kun aliaj, jam aperigis statistikan analizon de la morfemaro de PIV (Corsetti k.a. 1980), mi diru ĉi tie ke en neniu vortaro de la angla, de la

germana ktp mi ĝis nun trovis tiom da personaj inventaĵoj de la vortaristo. Neniu angla vortaristo kuraĝus presigi sian preferon por eventuala termino kiel *Occident* anstataŭ la normala *East*. Amason da tiaj aferoj la tiama prezidanto de la Akademio de Esperanto faris. La leganto juĝu mem, ĉu por li Esperanto estis vera lingvo aŭ ankoraŭ manipulebla lingvoprojekto.

13. Ne temas ĉi tie, evidente, pri la “spirito de la lingvo” laŭ la kompreno de Humboldt, sed simple pri la maniero laŭ kiu Esperanto funkcias.

BIBLIOGRAFIO

- Arends, J., P. Muysken kaj N. Smith (red.). 1995. *Pidgins and Creoles – An Introduction*. Amsterdam: John Benjamins.
- Bickerton, D. 1984. The Language Bioprogram Hypothesis. *The Behavioral and Brain Sciences* 7: 173-188.
- Blanc, H. 1968. The Israeli Koine as an Emergent National Standard. En J. A. Fishman, C. A. Ferguson kaj J. Das Gupta (red.), *Language Problems of Developing Nations*. New York: John Wiley and Sons, Inc.
- Blanke, D. 1989. Planned Languages – A Survey of Some of the Main Problems. En K. Schubert, (red.), *Interlinguistics – Aspects of the Science of Planned Languages*. Berlin/New York: Mouton de Gruyter.
- Chomsky, N. 1957. *Syntactic Structures*. Berlin: Mouton. [Itala traduko: *Le strutture della sintassi*. Bari: Laterza, 1969.]
- Corsetti, R. 1986. *Knedu min sinjorino! Tabuaj kaj insultaj esprimoj en Esperanto*. Paris: La Kancerklinikoteko.
- . 1996. A Mother Tongue Spoken Mainly by Fathers. *Language Problems and Language Planning* 20/3: 263-273.
- Corsetti, R., M. La Torre kaj N. Vessella. 1980. Pliriĉigo de la morfemaro en la internacia planlingvo. En I. Szerdahelyi (red.), *Miscellanea Interlinguistica*. Budapest: Tankonykiado, 368-379.
- De Mauro, T. 1963. *Storia linguistica dell'Italia unita*. Bari: Laterza.
- Ferguson, C. 1959. Diglossia. *Word* 15: 325-340.
- Grimley-Evans, E. 1996. Enketo inter komputistoj. *La Verda Proleto* 402: 7.
- Helman, A. 1977. Volkswijsheid en orale literatuur van Suriname. En A. Helman (red.), *Cultureel mozaïek van Suriname*. Zutphen: Walburg Pers.
- Horowitz, E. 1988. *How the Hebrew Language Grew*. New York: Ktav.
- Labov, W. 1972. On the Mechanism of Linguistic Change. En J. J. Gumpertz kaj D. Hymes (red.), *Directions in Sociolinguistics*. New York: Holt, Rinehart and Winston.
- Large, A. 1985. *The Artificial Language Movement*. Oxford: Basil Blackwell.
- Lloancy, M. T. 1995. *Esperantistoj kaj normo – Socilingvistika enketo pri parola Esperanto-normo 1992-1995*. Pau: ĉe la aŭtoro.
- Maamouri, M. 1990. Impact des développements technologiques récents sur l'enseignement de l'arabe standard en Tunisie: état de la question. En G. Gagne k.a. (red.), *Didactique des langues maternelles*. Bruxelles: De Boeck-Wesmantel.
- Pavanetto, C. 1991. *Elementa linguae et grammaticae latinae*. Roma: LAS.
- Piron, C. 1989. *La bona lingvo*. Wien/Budapest: Pro Esperanto/Hungara Esperanto-Asocio.

- Sakaguchi, A. 1995. Zum Begriff der Kompetenz in einer Plansprache: Esperanto. En H. M. Ölberg (red.), *Beiträge zur Interlinguistik*. Mitteilungen aus dem Institut für Sprachwissenschaft–Innsbruck, Report 7.
- . 1996. Die Dichotomie “künstlich” vs. “natürlich” und das historische Phänomen einer funktionierenden Plansprache. *Language Problems and Language Planning* 20/1: 18-38.
- Schubert, K. (red.). 1989. *Interlinguistics – Aspects of the Science of Planned Languages*. Berlin/ New York: Mouton de Gruyter.
- Skuttnab-Kangas, T. 1984. *Bilingualism or Not*. Clevedon: Multilingual Matters.
- Titone, R. 1991. Il fattore “età” nell’acquisizione linguistica (L1 e L2): dimensioni di un “meta-problema”. *Rivista Italiana di Linguistica Applicata* 23/2: 235-249.
- UNESCO. 1953. *The Use of Vernacular Languages in Education*. Paris: Unesco.
- Versteegh, K. 1993. Esperanto as a First Language: Language Acquisition with a Restricted Input. *Linguistics* 31: 539-555.

Ĉu lingvopolitikon por Esperanto?

DETLEV BLANKE

Enkonduke

Jen kaj jen dum la lastaj jaroj leviĝis diskutoj pri tio, kio estas lingvopolitiko rilate al Esperanto, ĉu Universala Esperanto-Asocio devus havi iun apartan lingvopolitikon, kaj simile. La Komitato fondis komisionojn (ili venis kaj iris...) kaj akceptis diversajn rezoluciojn, ofte sufiĉe belajn. Tamen, eble ne fariĝis sufiĉe klare, kio estas aŭ estu la “lingvopolitiko” de kio. Kaj krome, mi suspektas, ke nur malmultaj pretis akcepti, ke entute necesas okupiĝi pri la temo. La lingvo ja estas bela, funkcias. Eŭropo kaj la mondo havas lingvajn problemojn. Do, neniu vojo preter Esperanto. Do, kial lingvopolitikon por Esperanto? Kiu bezonas ĝin kaj – multe pli komplike – kiu devus okupiĝi pri ĝi? Organizaĵoj, individuoj, kiu entute? Jen jam la dilemo. Sed ni konsciu: minoritatoj batalantaj por siaj lingvoj, ŝtatoj kaj organizaĵoj, ili ofte havas sian lingvopolitikon pri sia(j) etnolingvo(j). Kial tio ne koncernu ankaŭ Esperanton?

Ĉu do temu pri “lingvopolitiko de UEA”? Certe. Sed tio ne sufiĉas. Necesas lingvopolitiko, kiu koncernu la tutan lingvo-komunumon de Esperanto. Kvankam ĝi nenial reduktiĝas al UEA kaj eĉ ne identas kun la sumo de ĉiuj esperantistaj organizaĵoj kaj institucioj, UEA tamen devus ludi gravan rolon en tio. Sendube, aparte la Akademio devus ludi aktivan rolon.¹

Necesus do komuna lingvopolitika strategio de kiom eble plej multaj partoj kaj strukturoj de la tuta lingvo-komunumo, de la ĉefaj periodaĵoj, eldonejoj, la tuta infrastrukturo kaj multo alia devus enplektiĝi, ankaŭ influhavaj individuoj kaj simile.

Certe, pri ĉio oni povas diskuti, eĉ nepre devas. Pro tio mi denove klopodas reliefigi mian pozicion kaj miajn proponojn pri la temo.¹

1. Difinoj

La nocion “lingvopolitiko” oni ofte trovas en rilato kun naciaj lingvoj. Ekz. konatas, ke Indonezio, Israelo aŭ Francio havas aktivan lingvopolitikon. Pli kaj pli oni diskutas la tiklajn aspektojn de postulenda klara lingvopolitiko de Eŭropa Unio kaj simile.

Parolante pri lingvopolitiko lige al Esperanto, oni ofte nur pensas pri la disvastigo de la lingvo en difinitaj sociaj medioj, ekz. en EU aŭ UN.

Tamen, la afero ŝajnas esti pli komplika.

1.1. Kio estas “politiko”?

Por niaj bezonoj iom krude, ni difinu: Politiko estas sistema aktivado aŭ aktiva sinteno de homo, homa grupo, organizaĵo, institucio aŭ ŝtato por konservi, ŝanĝi aŭ atingi difinitan celon aŭ staton.

1.2. Kio estas lingvopolitiko?

En la germana, tre konvene, ekzistas diferenco inter:

- a) **Sprachenpolitik**: “politiko pri lingvoj” (laŭvorte “lingvoj-politiko”);
- b) **Sprachpolitik**: “politiko pri lingvo” (laŭvorte “lingvopolitiko”).

Tion distingante, en la germana oni komprenas sub la du nocioj:

a) politiko pri lingvoj

tutecon de celoj kaj konformaj agoj de ŝtato rilate al:

- la rolo de fremdaj lingvoj en la propra ŝtato (ekz. rolo de fremdaj lingvoj en la propra kleriga sistemo), resp.
- la rolo de la propra lingvo ekster la propra ŝtato (ekz. en internaciaj organizaĵoj, disvastigo de la lingvo en aliaj landoj kaj regionoj k.s.);

b) politiko pri lingvo

tutecon de la celoj kaj konformaj agoj de ŝtato pri la konservo (foje “purigo”) kaj evoluigo de la propra enlanda lingvo (resp. lingvoj). Ĉi tio ofte ligitas kun *lingvo-planado*, *lingvo-direktado*, *lingvo-normigado*, *lingvo-kulturado*.

Por a) kaj b) multaj ŝtatoj havas apartajn instituciojn. Por parto de a) (rolo de la germana lingvo kaj kulturo eksterlande), la germanoj havas i.a. la Goethe-Institutojn, kaj por b) i.a. la Instituton pri la Germana Lingvo en Mannheim kun la Duden-redakcio. Krome ekzistas diversaj sciencaj institutoj, privataj institucioj kaj societoj kun siaj eldonaĵoj.

En la Esperanta lingvouzo oni ĝenerale ne faras la distingon supre menciitan.

2. Lingvopolitiko de la Esperanto-komunumo (LiPEK)

Kiel jam supre menciite, estus bone la lingvopolitikajn konceptojn ne limigi al la organizaĵo UEA. Ni konsideru la lingvopolitikon de la Esperanto-komunumo (LiPEK). Pri kio do temu?

LiPEK povus esti la strategio kaj taktiko de la Esperanto-komunumo por

- a) konservi certan staton de Esperanto (Eo) kiel lingvo (ekz. fundamenteco, stabileco ktp);
- b) pluevoluigi (resp. krei kondiĉojn por pluevoluigi) Eon por *ĝeneralaj* (ĉiutaga lingvo ktp) kaj *specifaj* celoj (faka, beletra, familia ktp);
- c) konservi resp. atingi certan socian statuson de Eo en la neesperantista socio.

Por pli bone kompreni la interrilatojn de tiuj tri, estus utile, distingi inter *interna* kaj *ekstera* LiPEK.

2.1. Interna LiPEK

Sub *interna LiPEK* mi provizore komprenas la strategion kaj taktikon de la Eo-komunumo celanta:

- a) la konservon de la stabileco de Eo kiel lingvo kaj la klaran fikson kaj respektigon de ĝia normo (do devus esti pli da *klareco kaj interkonsento* i.a. pri jenaj diferencoj aŭ nuancoj: ĉu ni celu la “akademi-kontrolatan”, la “analiz-skolan”, la “iltis-manifestan”, la karolo-piĉan aŭ alispican Eon? Ĉu ni nomu la lingvon de Zamenhof, laŭnorme “Esperanto” aŭ, erarige kaj malesperantologie, “iLo”?);
- b) la pluevoluigon de Eo, adekvatan al la nuntempaj kaj estontaj komunikbezonoj (aparte, se temas pri faka apliko);
- c) la kreadon de modernaj kaj aktualaj registriroj pri la lingvo (tio signifas, ke ili estu pli aktualaj kaj pli kompletaj ol la nunaj PIV kaj PAG: do ekz. science prilaborita gramatiko, ampleksaj ĝeneralaj, specialaj fakaj kaj aliaj vortaroj, ĝisdataj registriroj de la lingva apliko, ktp);
- d) la adekvatan sciencnivelan esploron de la fontoj, strukturo, funkciado, evoluo kaj apliko de Eo (kaj la precizan dokumentadon de tiu esplorado, do i.a. bibliografiadon);
- e) la klerigon de la Eo-komunumo, por krei en ĝi komprenemon pri (kaj aktivan rilaton al) LiPEK;
- f) la kreon de taŭgaj novaj instancoj, resp. la reformon de la ekzistantaj por atingi la celojn supre menciitajn.

Tio estas komparebla kun la germana kompreno sub 1.2. b).

La Akademio de Esperanto devus havi pozicion pri la interna LiPEK. Sed por multaj demandoj la kadro estus pli larĝa.

2.2. Ekstera LiPEK

Sub *ekstera LiPEK* ni komprenu la strategion kaj taktikon de la Eo-komunumo:

- a) krei por Eo favorajn kondiĉojn en la neesperantistaj *naciaj* sciencaj, politikaj kaj sociaj medioj;
- b) krei por Eo favorajn kondiĉojn en neesperantistaj *internaciaj* politikaj, fakaj kaj aliaj sociaj medioj kaj organizaĵoj (ekz. UN, Unesko, fakaj mondaj organizaĵoj k.s.) kaj ŝtataj organizaĵoj (ekz. Eŭropa Unio);
- c) kompetente kaj adekvate defendi Eon kontraŭ neseriozaj kaj malĝustaj atakoj.

Nur kun funkcianta interna LiPEK estas antaŭvideblaj pli grandaj sukcesoj en la ekstera LiPEK.

3. Ĉu ni bezonas LiPEK?

Pri tio certe ekzistas malsamaj opinioj. La respondo al la demando eble dependas de diversaj faktoroj, i.a. de tio, ĉu oni vidas en Eo:

- inteligentan ludilon (daŭre laŭplaĉe “plibonigeblan”);
- lingvon por en si enfermita kaj elita minoritato;
- (necese stabilan kaj riĉan) modelon de lingvopolitika alternativo por la interreta komunikado.

La respondo pri la neceso de LiPEK ankaŭ dependas de tio ĉu oni opinias:

- ke Eo povas/devas evolui absolute tiel “nature” kiel etnolingvoj; aŭ
- ke necesas certa aktiva sinteno al ĝia evoluo (do multaj ebloj inter la polusoj “plene libera” → lingvoplane “stirita” evoluo).

Krom tio gravas, kiom fortaj oni taskas la konverĝajn resp. la diverĝajn lingvo-evoluigajn faktorojn, kiuj efikas al Eo (kiel, kun specifaĵoj, al iu ajn lingvo).

4. Jes, ni bezonas LiPEK!

Ni bezonas ĝin aparte tiam, se ni volas proponi Eon al la “mondo” (aŭ “jam iom pli frue”, almenaŭ al Eŭropo) por difinitaj funkcioj, sen ridindigi nin mem. Pri kiuj komunikaj funkcioj kaj terenoj oni volu proponi la lingvon, tio estas ankoraŭ diskutinda.

Se ni do volus konvene atentigi pri Eo, tiam ni, almenaŭ laŭ mi, devus pli multe kaj pli sisteme agi por:

- pli bone konservi ĝian bazon (konservemo); kaj
- adapti ĝin pli bone al la komunikaj funkcioj de la nunaj kaj estontaj sociaj bezonoj (lingvoplanemo).

Eblas lerni el la rezultoj de lingvoplanado ĉe etnolingvoj (i.a. rolo de lingvo-kulturadaj, lingvoplanadaj instancoj, akademioj k.s.).

5. Internacia Lingvopolitika Konsilantaro de Eo (ILKE)

Kvankam novaj komisionoj, organizaĵoj kaj aliaj strukturoj en Esperantio ofte estas dekomence mortnaskitaj, oni eble tamen povus pensi pri iu instanco, reprezentanta la tutan lingvo-komunumon (aŭ tiujn partojn, kiuj akceptus la neceson de LiPEK). Ĝin ni provizore nomu Internacia Lingvopolitika Konsilantaro de Eo (ILKE).

La kreado de nova institucio ne devu senvalorigi la jam establiĝintajn, eĉ kontraŭe. Ĝi estus sencoplana nur, se ĝi senburokratie helpus aktivigi la tradiciajn kaj eble transprenus funkciojn, kiujn la ekzistantaj ne povas aŭ ne volas transpreni. Ĝi neniel celas anstataŭi la Akademion de Esperanto, sed eble helpus al ĝi pliaktiviĝi kaj vere pligravigus ĝian rolon.

5.1. Pri la celoj de ILKE

La celo de la agado de ILKE estu, antaŭ ĉio, harmonie kunordigadi kaj kunaktivigadi la diversajn lingvopolitike iel aktivajn grupiĝojn ene de la tuta Esperanto-komunumo por realigi la internan kaj eksteran strategiojn de LiPEK (vidu 2.1 kaj 2.2).

Tio povus koncerni i.a. AdE, TEC, CED kaj terminologie aktivajn fakajn asociojn, (en)universitate aktivajn kaj stabilajn instancojn (ekz. ELTE Budapeŝto), interlingvistikajn kaj esperantologiajn arkivojn, kolektivojn, organizaĵojn kaj simile.

Se oni tamen ne sukcesos ĉetabli la plej diversajn fortojn de la tuta movado, LiPEK provizore agadu laŭ la konstatebla kunlaboremo, en ekstrema (kaj espereble evitinda) kazo nur en la kadro de UEA.

5.2. Taskoj de ILKE

El la celoj de ILKE oni povas dedukti i.a. jenajn taskojn:

- krei la por 5.1 necesan infrastrukturon;
- stimuli celkonformajn debatojn por pli klare skizi la esencon de LiPEK;
- stimuli celkonformajn esplorojn;
- aktivigi kaj modernigi tiujn instancojn, kiuj jam ekzistas (AdE, TEC, CED k.s.);
- “eduki” la movadon en la senco de LiPEK.

5.3. Rimedoj

La celoj kaj taskoj de ILKE necesigas kelkajn rimedojn. Iuj jam ekzistas, aliaj devas esti kreitaj. Temas i.a. pri:

- organizpolitika kaj interndebata bulteno;
- faka revuo (ekz. iniciati la aperigon de faka periodaĵo por Eo, ĉu *Esperantologia Revuo* aŭ simile)³;
- radio-disaŭdigoj;
- pli bona kaj la laŭplana utiligo de la ekzistantaj eblecoj por publikigo (*LPLP*, Esperanto-dokumentoj kaj aliaj eldoneblecoj);
- aranĝoj dum UK-oj, sed regule ankaŭ ekster ili;
- financaj kaj teknikaj rimedoj de UEA (i.a. ties Centra Oficejo) kaj de aliaj partneroj de LiPEK;
- naciaj partneroj (bibliotekoj, aliaj arkivoj, universitataj pozicioj).

5.4. Ĉefaj agadoj

Ĉio ĉi estas ligita kun diversaj aktivaĵoj kaj agadoj, resp. necesigas ilin. Al tio i.a. apartenas:

- internaj kaj publikaj debatoj, aparte inter kompetentuloj;
- eldonado;
- organizado de aranĝoj;
- publikigo de rekomendoj kaj pozicioj;
- celkonforme partopreni en esperantistaj kaj neesperantistaj aranĝoj, ktp.

5.5. Strukturo

ILKE povus havi proksimume jenan strukturon: koresponda konsilantaro, en kiun eniras kompetentaj delegitoj el diversaj institucioj (AdE, CED k.s.) kaj organizaĵoj. (Necesus, tamen, difini, kio estas “kompetenteco” – malfacila sed neevitebla tasko.)

Pri la strukturo, agadformo, elektiĝo de homoj en ILKE, same pri financoj kaj simile, necesas ellabori praktikajn kaj neburokratajn solvojn.

6. Traktindaj temoj pri LiPEK kaj ILKE

Por iom pliprofundigi la komprenon pri la neceso de LiPEK kaj konkretigi, pri kiuj taskoj, agadoj kaj dezirindaĵoj ILKE devus okupiĝi, por kunordigadi LiPEK, sekvas listo de teoriaj temoj, kiujn necesas diskuti:

- a) La koncepto pri lingvopolitiko rilate al etnolingvoj, kiom kaj kiel ĝi estas uzebla por Eo?
 - b) Kiuj estu kadroj de interna kaj ekstera lingvopolitikoj de Eo?
 - c) Kion kovras la nuntempa normo de Eo? Kiom stabila ĝi estas aŭ estu? Kiel certigi ĝian respektadon?
 - ĉ) La konceptoj pri lingvoplanado en etnolingvoj, kiom kaj kiel ili estas uzeblaj por Eo?
 - d) Lingvaj institucioj en etnolingvoj – ĉu kaj kion eblas lerni de ili por Eo?
 - e) Kia estu la rolo de la Akademio de Esperanto kiel gvida lingvo-institucio de la Eo-komunumo?
 - f) Situacio kaj bezonoj por faka apliko kaj la faka lingvo (i.a. la rolo de la reaktiviginda Terminologia Centro de UEA, TEC);
 - g) Esperanta leksikografio en perspektivo – kiuj bezonoj ekzistas kaj kiel realigi ilin?
 - ĝ) Esperanta stilistiko en perspektivo – kiuj bezonoj ekzistas kaj kiel realigi ilin?
 - h) Esperanta gramatiko en perspektivo – kiuj bezonoj ekzistas kaj kiel realigi ilin?
 - ĥ) Politiko pri esplorado (interlingvistiko/esperantologio): kiuj temoj prioritatas?
 - i) Eldonpolitiko (beletro, faka literaturo, diversspecaj periodaĵoj, enciklopediaj registriroj, instruiloj, interlingvistikaj kaj esperantologiaj publikaĵoj kaj periodaĵoj, diverscelgrupaj informiloj ktp);
 - j) Interna dokumentado kaj bibliografiado (bibliotekoj, muzeoj, publikaj kaj privataj kolektoj, bibliografioj, katalogoj ktp);
 - ĵ) Arkivoj landaj (centraj, regionaj kaj lokaj niveloj) kaj de internaciaj asocioj kaj instancoj;
 - k) Politiko pri historiografio;
 - l) Nova, daŭre kompletigebla Enciklopedio de Eo;
 - m) Rolo de la novaj elektronikaj medioj (ekz. Interreto);
- ktp.

Ĉiukaze necesas debati pri prioritatoj kaj koncentri la malmultajn fortojn al difinitaj celoj.

NOTOJ

1. Sed tiam necesus entute redifini la celon, taskojn, strukturon kaj aktivaĵojn de la (tro) tradicia institucio. Kvankam tio al mi ŝajnas ege necesega, verŝajne nuntempe ne venas la necesaj impulsoj.

2. Kp. i.a. miajn ĉi-temajn kontribuojn en *Esperanto*, majo 1996, kaj *Informilo por Interlingvistoj* 16 (1/1996).

3. Espereble la iniciato de Christer Kiselmann, (re)lanĉi la revuon *Esperantologio – Esperanto Studies*, trovos la merititan reeĥon en la lingvo-komunumo. Ĝi ja taŭgus por la menciita celo.

ALDONAĴOJ

Rezolucioj de la Komitato de UEA pri lingvopolitiko

En la 77-a UK, Vieno 1992:

Konstatinte pri la manko de kohera lingva politiko ĉe UEA kaj pri la bezono pritrakti plurajn lingvajn aspektojn, la Komitato:

konstatas, ke la lingvan evoluon de Esperanto konsistigas interplekto de pluraj elementoj: la parolata lingvo, literaturo, gazetaro, movado kaj la Akademio de Esperanto;

notas, ke inter tiuj elementoj la revuo *Esperanto*, la publikaĵoj de UEA kaj TEJO kaj la lingvaj instancoj (kiel AdE kaj TEC) havas esencan rolon;

konstatas, ke por sana lingva evoluo de Esperanto estas grave, ke ekzistu regula informfluo kaj harmonia kunlaboro inter tiuj instancoj;

komisias al la Estraro krei strukturon, kiu difinu kaj konkretigu la lingvan politikon de UEA kaj kunordigu la interrilatojn inter la elementoj menciitaj ĉi-supre;

rekomendas, ke la Estraro tasku difinitan estraranon aŭ komisiiton pri lingvopolitiko kaj rilataj temoj;

rekomendas serioze konsideri la diversajn eblecojn por eldono de nova aŭ reviziita Esperanto-vortaro, verkita de fakuloj laŭ modernaj leksikografiaj kriterioj.

En la 80-a UK, Tampere 1995:

La Komitato,

konsiderante la diskutojn en la laborgrupo pri lingvopolitiko kaj en la koncerna parto de la Esperantologia Konferenco,

konsciante pri la neceso ellabori koheran lingvopolitikon de UEA adekvatan al la bezonoj de la Esperanto-komunumo,

1. *kreas* konstantan komisionon pri lingvopolitiko;
2. *komisias* ĉi tiun komisionon okazigi seminarion pri “lingvopolitiko de UEA”, rekte antaŭ la 81-a UK en Prago;
3. *komisias* la komisionon ellabori konvenajn proponojn pri lingvopolitiko de UEA kaj prezenti ilin al la Komitato dum ĝia kunsido en Prago.

En la 81-a UK, Prago 1996:

La Komitato de UEA

alte taksas la okazigon de la unua komitata seminario pri lingvopolitiko, kiu metis fundamenton por pli altnivela traktado de lingvopolitikaj temoj en la gvidaj organoj de UEA;

konstata la bezonon daŭrigi kaj pliprofundigi la laboron sur tiu kampo, inkluzive de la scienca esplorado pri Esperanto, la provizado de konsiloj kaj referenciloj por la lingvouzantoj, kaj la evoluigo de vortaroj kaj fakaj terminaroj laŭ internacie akcepteblaj normoj;

kaj tial *plivastigas* la mandaton de la Komisiono pri Lingvopolitiko, konsistanta el komitatoj Blanke, Fettes, Wandel kaj Yamasaki, per jenaj taskoj:

1. diskonigi la rezultojn de la seminario, eventuale i.a. per la eldono de la referaĵoj en iu modesta formo;

2. iniciati diskutojn kun la Centro de Esploro kaj Dokumentado (per ties direktoro d-ro Tonkin), kun la Akademio de Esperanto (per ties prezidanto d-ro Bormann), kun la interesitoj pri Terminologia Esperanto-Centro (per komitatoj d-ro Blanke kaj s-ro Darbellay), kaj eventuale kun aliaj lingvopolitike aktivaj organizaĵoj kaj grupoj, por plua evoluigo de komuna lingvopolitiki programo;

3. prezenti al la Komitato raporton kun rekomendoj por diskuto ĉe la 82-a Universala Kongreso en 1997;

4. konsideri la organizadon de dua lingvopolitika seminario en la proksima estonteco.

El *Esperanto*, septembro 1996 (p.150):

Unua lingvopolitika seminario

La unua seminario de UEA pri lingvopolitiko okazis sabate, antaŭ la malfermo de la UK, kaj allogis ĉ. 90 kongresanojn.

Interkonsulte kun la komisionanoj Mark Fettes, Amri Wandel kaj YAMASAKI Seikô, mi organizis ĝin sekvante la lastjaran rezolucion de la Komitato pri lingvopolitiko. Ĝia celo estis, surbaze de la konceptoj esprimataj en ĉi tiu revuo (majo, p. 89-90), konkrete trakti pri kvar difinitaj lingvopolitikaj temkompleksoj:

Pri bazaj konceptoj de lingvopolitiko kaj lingvoplanado en etnaj lingvoj enkonduke prelegis prof. Humphrey Tonkin, pri *ekzemploj el la japana* informis YAMASAKI Seikô, kaj *pri la (nov)hebrea* prof. Amri Wandel. Ĉi tiu enkonduka parto celis konsciigi nin pri la ekzisto de lingvopolitiko kaj lingvoplanado ĉe etnaj lingvoj, el kies ekzemploj oni eble povus lerni por Esperanto.

La *rolon de planlingvaj akademioj* prilumis d-ro Sergej Kuznecov, kiu prezentis tipologion de tiuj institucioj. D-ro Werner Bormann skizis siajn vidpunktojn pri la *estonta laboro de la Akademio de Esperanto*.

La atenton de la Akademio devus tuŝi ankaŭ la temo de d-ro Renato Corsetti. Elirinte el siaj familio-lingvaj spertoj, li atentigis pri la observebla *kontraŭdiro inter personaj lingvaj gustoj kaj la oficiala lingva normo*.

La leksikografio en Esperanto estas aparte grava tereno. *Tipologion de ĉefaj etnolingvaj vortaroj* prezentis prof. John Wells, kaj tiel, nerekte, li komprenigis al la aŭskultantoj ke multo estas farenda por pli bone evoluigi la Esperantan leksikografion.

Fine Mark Fettes substrekis la neceson ellabori koheran lingvopolitikon kaj prezentis ideojn por realigi ĝin.

La kontribuoj vekis tre viglan diskuton, kvankam la disponebla tempo neniel sufiĉis. Estas planite eldoni la materialon kaj organizi pluan seminarion, sed kun pli limigita temaro. Portempa komisiono de la Komitato de UEA pri lingvopolitiko serĉos vojojn por plu okupiĝi pri tiu temo. Ĉe tio la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED) kaj la Akademio de Esperanto certe devos ludi aparte aktivan rolon.

Detlev Blanke (Germanio)

Ĉu ni bezonas lingvopolitikon? Kio entute estas lingvopolitiko? Ĉu ĝi estas necesa nur por UEA, la ĉefa reprezentanto de la Esperanta komunumo, aŭ ĉu ĝi devus koncerni la tutan komunumon? Ĉu por la konceptado kaj plenumado de nia lingvopolitiko eblas lerni el la spertoj de naciaj lingvoj? Pri tiuj temoj diskutis la lingvopolitika seminario de UEA en la Praga UK en 1996. En tiu ĉi volumo aperas ĝiaj materialoj, por ke ili estu bazo por plua lingvopolitika aktivado.

SUR LA KOVRILO:

Al Marie Hankel (24 marto 1910):

Kara Sinjorino!

Kiam mi siatempe redaktis la germana-esperantan vortaron (eldonitan de Borel), ĝi estis afero tute senkulpa, ĉar ĝi prezentis nur konsilon pri novaj vortoj; tamen kelkaj personoj forte min atakis. Se mi nun eldonus pli grandan gramatikon, ĉiuj nekonsentantoj atakus min ankoraŭ multe pli. Persono mi tiujn atakojn ne timas; sed por nia afero ĉia polemiko, en kiun mi estus enmiksita, estus tre danĝera. Multe pli bone estos, se mi staros flanke kaj lasos la decidon pri ĉiuj dubaj demandoj al la Akademio aŭ al la verkistoj.

Via Zamenhof

P.S. Miajn klarigojn mi povus doni nur en tia okazo, se pri tio petus min ne privataj personoj sed la Lingva Komitato.

ISBN 92-9017-062-X



9 789290 170624